

Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2009 numero 2-a: aprilo-junio
dissendo je la 1-a de majo



Fotis Claude Gacond

Kiam kratago floras, printempo revenis.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, CP 480,
CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : gacond@bluewin.ch

Tel. : hejme: 032 926 52 32
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:

Nancy Fontannaz, Stefano Keller,
Richard Schneller

SES informas

Redaktaj datlimoj

2009-3 : julio-oktobro :

julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.

2009-4 : novembro-decembro :

oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.

2010-1 : januaro-marto :

januare 10, dissendo 1-an de februaro.

2010-2 : aprilo-junio :

aprile 10, dissendo 1-an de majo.

Konsultu la retejon de SES !

www.svisa-esperanto-societo.ch

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto,
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel. :
076 261 06 09.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, PF
301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.
Retpoŝto : info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034,
1002 Lausanne. Tel.: 076 261 06 09.
Retpoŝto: stefano.keller@kontakto.info

Hans-Werner Grossmann, kasisto,
Esperanto-Servo, PF 262, 4132
MuttENZ 1. Tel.: 076 460 89 92.
Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Poŝta ĉekokonto :

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

Vivo de SES

2009-2 - Redaktis: Stefano Keller

Jarraporto pri 2008

Membraro.

SES havis 148 membrojn fine de la jaro. Bonvenon al la 17 novaj membroj, kiuj aliĝis dum 2008. Malaperis 16 membroj pro malaliĝo aŭ morto. La forpasintoj estas: Marguerite Jayet (kiu legaciis 2'000 CHF al nia societo), Werner Glättli kaj Claude Piron.

Aktivecoj.

Krom la Ĝenerala Kunveno de SES okazinta en Berno la 12-an de aprilo 2008, la jaro havis plurajn signifajn eventojn.

SES alportis sian apogon al la *Simpozio pri lingvaj rajtoj*, kiun okazigis UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo la 24-an de aprilo. Unu el la ĉefaj organizantoj de la evento estis Stefano Keller, sekretario de SES. Ankaŭ niaj kunprezidantoj partoprenis la simpozion. Nomo de SES alparolis la kunvenintojn Dietrich M. Weidmann. Mireille Grosjean ĉeestis la okazaĵon kun sia lerneja klaso, kadre de vizito al UN.

Sekve al la kompetenta pretiga laboro de Claude Gacond, kreinto kaj arkivisto de CDELI, la 12-an de oktobro 2008 naskiĝis la *Asocio Amikoj de CDELI*, kiu celas interalie konigi la aktivecojn, subteni la projektojn, kulturajn aranĝojn de la mondfama arkivejo de la Urba

Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Ĝia faka organo, *Esperanto-Amikaro de CDELI*, statute celas alporti apogon al la kreita Asocio koncerne al esperanto. Vizitu: www.cdeli.org

La 1-an kaj 2-an de novembro 2008 okazis la *Svisa semajnfino* en Sangernboden, kiu estis tre sukcesa familia renkonto esperantista, modelo por similaj aranĝoj estonte.

Memore de Claude Piron, la elstara esperantisto, SES organizis la 15-an de novembro, en kunlaboro kun CDELI, memortagon pri la personeco kaj verkaro de tiu altestimata samideano, kiun perdis la esperanta mondo en januaro 2008.

Tutcerte ankaŭ aliaj eventoj estis interesaj kaj sukcesaj kadre de la agado de niaj lokaj grupoj.

Ni menciuj ĉi tie alian signifan, ekstermovadan eventon al kio alportis sian kunlaboron SES kaj CDELI. Alain Bringolf, deputito de la kantono Neŭŝatelo, pretigis en kunlaboro kun Mireille Grosjean mocion « Valoriser l'espéranto », kio estis submetita en la kantono la 21an de februaro 2008, kun subskribo de 27 parlamentanoj el diversaj partioj. Alain Bringolf estis jam delonge en kontakto kun Claude Gacond, tiel li havis okazajn konatiĝojn kun la mondo de la internacia lingvo, konvinkiĝi pri ties

utiligoj kaj malkovri la argumentojn favore al esperanto. La parlamento de la kantono Neŭŝatelo akceptis la mocion per 60 poraj voĉoj kontraŭ 41, la 18-an de februaro 2009.

Informado

La kunprezidantoj kaj la sekretario de SES daŭrigis siajn diskonigajn agadojn dum la jaro, dissendante gazetarajn komunikojn kaj kontaktante diversajn svisajn politikistojn.

Financoj

Ni buĝetis plielspezojn de 8'000 CHF. Tamen, la fina rezulto montras plielspezojn de 676.30 CHF. Tiu diferenco venas ĉefe el la prokrasto de la ekaperigo de "Lingvo futura", la planita nova revuo, kies eldonon ni decidis subvencii. Plie ni aperigis nur 4 bultenojn "SES informas" anstataŭ 5. Ĝenerale la administrado estis malpli kosta, ĉar plej multaj membroj akurate pagis la kotizon, sen admono (ŝparo de leterpapero, kovertoj, afranko). Ni elkore dankas al nia kasisto pro lia elstara laboro.

Organoj

« SES informas » aperis kvarfoje dum la jaro kun informoj pri la vivo de la societo kaj kun enhavo kultura. Redaktaj kunlaborantoj de Claude Gacond estas Nancy Fontannaz, Richard Schneller kaj Stefano Keller.

La projekto de la nova revuo plurlingva « Lingvo futura » ne povis esti realigata pro diversaj okupitecoj de la redaktantoj. Dum

2009 okazos la pretigo de provnumera materialo.

Universala Esperanto Asocio kaj aktivecoj ĉe UN en Ĝenevo

Mireille Grosjean reprezentas SES-n ene de la komitato de UEA, kies landa sekcio nia societo estas.

SES alportas valoran kunlaboron al UEA en la realigo de ties kontaktoj kaj aktiveco ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo. En 2008 Svisa Esperanto-Societo subvenciiis la Simpozion de UEA ĉe UN pri lingvaj rajtoj, per donaco de mil svisaj frankoj. Stefano Keller, sekretario de SES iĝis reprezentanto de UEA ĉe UN en 2008, kaj ekde 2009 li estas la ĉefreprezentanto. La aliaj estraranoj kaj membroj de SES, kiuj estis aŭ iĝis reprezentantoj de UEA ĉe UN estas: Mireille Grosjean, Dietrich Weidmann, Nicole Margot, Charmian Common kaj Cesco Reale.

Dum 2008 Stefano Keller, Cesco Reale kaj Charmian Common aktive partoprenis en jenaj eventoj: 2008-09-01/03, Socia Forumo pri malriĉeco; 2008-09-08/26, 9-a sesio de la Homrajta Konsilio de UN; 2008-10-27/28, Forum sur le développement de la société civile; 2008-12-12, Memorsesio de la Homrajta Konsilio celebranta la 60-an datrevenon de la Universala Deklaro pri Homaj Rajtoj; 2008-12-15/16, 1-a sesio de la Forumo pri Minoritatoj, organizita de la Homrajta Konsilio. Videoraportoj kaj intervjuoj de tiuj aktivecoj estas publikigitaj rete ĉe Youtube:

www.youtube.com/EsperantoTv kaj
www.youtube.com/LinguisticRights

La estraro de SES daŭre subtenis la agadon de UEA pri lingvaj rajtoj. Pri tiu agado informas la retejo: www.lingvaj-rajtoj.org

Plilarĝigo de la Estraro

Post alelekto de nova estrarano en 2008, la komitato de SES konsistas el Mireille Grosjean kaj Dietrich

Weidmann, la du kunprezidantoj; Nelida Weidmann, la nova estrarano; Hans-Werner Grossmann, kasisto kaj Stefano Keller, sekretario. La komitato regule kunvenas en Bielo, inter la Ĝeneralaj Kunvenoj kaj laŭ bezono de aktualaj diskutendaĵoj.

Raportis :

*Stefano Keller, sekretario de SES,
Laŭzano, la 4an de aprilo 2009*

Donacoj ricevitaj dum januaro, februaro kaj marto 2009

S-ino Louise Bachmann, Emmen (15) - Ges-roj Tazio kaj Teresita Carlevro, Bellinzona (50) - Ges-roj Gabriel kaj Verena Chaves-Walder, Flawil (30) - S-ino Lucienne Dovat, Renens (200) - S-ino Elisabeth Eisenegger, Zürich (15) - S-ro Emiliano Garcia Gomez, Ferney-Voltaire (5) - S-ro Walter Gaxer, Lausanne (15) - S-ro Ernst Glättli, Brugg (15) - S-ro Noël Huguenin, La Chaux-de-Fonds (20) - S-ino Jeanne Mamin, La Tour-de-Peilz (20) - S-ro Hans Meier, Basel (15) - S-ino Barbara Pochanke, Wil (15) - S-ro Konrad Rey, Luzern (250) - S-ro Paul Scherer, Emmenbrücke (15) - S-ro Marc Vigny, Petit-Lancy (25) - S-ino Paula Vité Genève (5) - S-ro Erich Werner, Hochdorf (50) - Entute: CHF 760. Grandan dankon al la malavaraj subtenantoj de nia societo!

Estrarkunsido de SES, Bielo, je 2009 februaro 21 Resuma raporto

Ĉeestis: Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Nelida Weidmann, estrarano, Hans-Werner Grossmann, kasisto, Stefano Keller, sekretario. Senkulpigita: Mireille Grosjean, kunprezidanto, kiu tiutempe restadis en Japanio.

Diskuttemoj:

SFERO: la granda familia renkonto en Lenk. Nelida Weidmann organizas la eventon. Por pli da

detaloj bonvolu viziti la retejon: <http://esperanto.ch/sfero/>

Konkurso Esperanto: SES organizas konkurson por partoprenantoj el tuta Svislando. Diskutitaj estis la detaloj, la kronologio de la agado. Legu pli pri la konkurso en la artikolo troviĝanta post la enciklopedia raporto. Pri traktitaj estis ankaŭ la *Jarraporto*, la revuo *Lingvo Futura*, financa raporto pri la *Enciklopedio*.

Bilancio - Jarkalkulo - Buĝeto

		Bilancio			
N-ro	Konto	1.01.2008	31.12.2008		
1010	Poŝtkonto	3'261.47	4'102.87		
1011	Kasobligacio de la poŝto (antaŭe: fiksa poŝtdepono)	7'000.00	7'000.00		
1030	WIR Banko	27'623.05	27'877.40		
1060	Prunto al KCE	15'000.00	15'000.00		
1090	UEA konto sesa-v	60.88	260.78		
1100	Inventaro	1.00	1.00		
1150	Bonhavo ĉe ESTV: Antaŭimposto	177.10	187.75		
	Sumo aktivoj	53'123.50	54'429.80		
2000	Transaj pasivoj	660.00	1'290.00		
2100	Kapitalo	52'463.50			
	+ pliensezoj de 676.30 = nova kapitalo		53'139.80		
	Sumo pasivoj	53'123.50	54'429.80		
		Jarkalkulo	Buĝeto		
		2008	2008	2009	
3000	Informado, varbado	2'388.35	4'000.00	3'000.00	
3010	Omagoj, laborrimedoj	135.00	200.00	200.00	
3020	Subvencioj, premioj, projektoj	1'433.00	2'000.00	8'000.00	
3110	SES informas elspezoj	1'886.45	3'000.00	3'000.00	
3120	Kunvenoj kaj kunsidoj (ĜK, estrara, regionaj)	506.80	700.00	700.00	
3150	Abono al revuoj		150.00	0.00	
3200	Kotizoj al UEA, EEU, ktp.	250.40	200.00	250.00	
3210	Administrado (afrankoj, telefonkostoj, ktp)	177.70	500.00	300.00	
3220	Bank- kaj poŝtspezoj	95.70	150.00	100.00	
3230	Donaco al KCE	450.00	450.00	450.00	
3500	Diversaĵo		300.00	300.00	
	Sumo elspezoj	7'323.40	11'650.00	16'300.00	
4200	Membrokotizoj	4'840.00	5'000.00	5000.00	
4210	Abono al SESi sen membreco	575.00	500.00	500.00	
4300	Donacoj, heredaĵoj	1'615.00	1'500.00	5'500.00	
4600	Intereso: WIR Banko, PostFinance kaj KCE	969.70	1'000.00	700.00	
	Sumo enspezoj	7'999.70	8'000.00	11'700.00	
	Pliensezoj (+) / Pliensezoj (-)	+ 676.30	- 3'650.00	- 4'600.00	

21.02.2009 /HWG

Raporto de la kaskontrolantoj por 2008

Ni, subskribintoj, Dieter Rooke kaj Bruno Graf, kunsidis kun la kasisto Hans Grossmann la 18-an de februaro 2009 en Olten por kontroli la librotendon.

La saldoj de la jaro 2007 estas ĝuste transskribitaj, la kontrolitaj ciferoj kongruas kun la pruviloj, same la saldoj fine de 2008. Ni ekzamenis detale difinitajn elspezojn. La administraj kostoj estas surprize malaltaj.

La fina rezulto de la kontoj 2008 estas plienspezo de 676.30 frankoj, tiel ke la kalkulo estas ekvilibrata. Enspezoj kaj elspezoj multe dependas de projektoj kaj donacoj.

Samtempe ni ekzamenis la apartan konton Enciklopedio, kiun la kasisto prizorgas por CDELI kaj SES. Danke al la grandaj donacoj tiu konto montras pluson. Oni povas konkludi, ke tiu projekto, spite de opiniaj diferencoj, estas sukcesinta. Estas venditaj 196 libroj kaj restas stoko de 250 ekzempleroj.

Ni dankas multe al Hans Grossmann pro la akurate farita librotendado. Ni rekomendas aprobi la kalkulon kaj bilancon 2008 kiel ankaŭ la konton Enciklopedio kaj malŝarĝi la kasiston kaj la estraron.

Bern, 20-an de februaro 2008

La kaskontrolantoj: Bruno Graf kaj Dieter Rooke



Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo sabate, la 16-an de majo 2009

en kunlaboro kun CDELI,

Freska Salono Charles Humbert de la Urba Biblioteko

La Chaux-de-Fonds, Strato Progrès 33, 1-a etaĝo.

Horaro :

10.00 Malfermo de la bibliotekaj salonoj de CDELI kaj Charles Humbert.

10.30 **Kunveno de la Esperanto-Fako de la Amikaro de CDELI** (en la CDELI-salono). Informado en la rubriko CDELI ĉe la parto **Tutsvisa aktiveco**.

11.00 Kafumo, eblo aĉeti librojn kaj brokantaĵojn (en la CDELI-salono).

11.30 Ĝenerala Kunveno de SES (en la Salono Charles Humbert).

Tagordo

1. Salutvortoj, nombrado de la ĉeestantoj, senkulpiĝoj.
2. Aprobo de la tagordo.
3. Evoluo de la membraro.
4. Aprobo de la protokolo de la Ĝenerala Kunveno 2008a (Berno) aperinta en *SES informas* 2008-3 p. 5-9.
5. Aprobo de la Estrara Raporto (en tiu ĉi numero).
6. Aprobo de la Financa Raporto (en tiu ĉi numero).
7. Aprobo de la Raporto de la kaskontrolantoj (en tiu ĉi numero).
8. Projekto « Konkurso por lernantoj de Esperanto » (en tiu ĉi numero).
9. Aprobo de la Buĝeto (en tiu ĉi numero).
10. Aprobo de la alekto de Nelida Weidmann al la Estraro de SES.
11. Eblaj pliaj elektoj (ne alvenis proponoj ĝis redaktofino).
12. Proponoj (Propono ne alvenis ĝis la 1-a de aprilo).
13. Diversaĵoj.

13.00 Komuna tagmanĝo (en najbara picejo).

14.30 Kultura programo organizita de CDELI (en la salono Charles Humbert)

1. Sub la gvido de Elisabeth de Mestral la Svisa Koruso prezentos 6 aŭ 7 kvarvoĉajn kantojn, inter kiuj tradiciaj kantoj el Svislando, baroka kaj renesanca kantoj el Francio kaj popolaj melodioj el Finnlando.
2. La gelernantoj de la lernejo *La Grande-Ourse* parolos al vi en esperanto per teatra spektaklo, kiun ili nun pretigas.
3. Benno Frauchiger rakontos per bildoprojekciado pri sia unujara biciklado de Svislando al Aŭstralio tra Kosovo kaj la aziaj landoj Irano, Pakistano, Barato.

16.15 Konkludo de la kultura programo kaj supreniro al la salono de CDELI por amika teumo kaj butikumo.

16.30 Oficiala konkludo de la renkonto.

17.30 Fermo de la salono de CDELI.

Infanoj

Paralele al la ĝenerala kunveno kaj al la kultura programo okazos okupoj ludaj kaj paroligaj por la infanoj, en lerneja aĝo, kun promenado al la bestĝardeno. La gepatroj venontaj kun siaj infanoj bonvolu sin anonci al Nancy Fontannaz : Rete : nancy.fontannaz@gmail.com - Telefone : 021 728 31 27 indikante siajn nomon, adreson kaj telefonnumeron, kaj la nomon kaj naskiĝdaton de la partoprenontaj infanoj. La SES-Estraro esperas je multnombra partopreno al tiu tago grava por la societo kaj dankas al CDELI pro ties kunlaboro.

Svisa Enciklopedio Planlingva
Financa raporto - stato je 31.12.2008

	CHF	
Elspezoj:		
Fakturo de la presejo Messeiller SA	30'720.00	
Afrankoj	2'466.75	
Spezoj poŝtkonto	109.30	
Vojaĝkostoj Claude Gacond	57.90	
Pagoj al A.Künzli por 192 venditaj ekz.	1'920.00	35'273.95
Enspezoj el vendoj		
En CHF fakturitaj vendoj	9'267.00	
En € fakturitaj vendoj je diversaj kurzoj	2'802.77	
Ĝiro el la UEA-konto € 900.00 je 1.593	1'433.70	13'503.47

Aliaj enspezoj		
Antaŭpago CDELI	5'000.00	
Antaŭpago Bibliotheko La Chaux-de-Fonds	5'000.00	
Antaŭpago Claude kaj Andrée Gacond	5'000.00	
Donaco André Sandoz	3'000.00	
Donaco Mireille Grosjean	1'000.00	
Donaco Bruno Graf	1'000.00	
Donaco ES-Lausanne	500.00	
Donaco de anonimulo (2 x 1'000.--)	2'000.00	
Diversaj donacoj (plipagoj)	231.25	
SES subvencio	5'000.00	
SES rabato	1'240.00	
Interezo poŝtkonto	10.80	28'982.05

Saldo de la poŝtkonto		7'211.57
Bonhavo antaŭimposto		2.40
UEA-Konto:	€	
Sumo pagoj en €	1'538.00	
Ĝiro al la poŝtkonto	-900.00	
Spezoj	-18.00	
Anonco jarlibro 2008	-70.00	
Bonhavo je 1.50	550.00	825.00
Sumo ne ankoraŭ ricevita je 1.50		100.50
Ŝuldo al A. Künzli por 4 dum 2008 venditaj ekz.		-40.00
Bonhavo entute		8'139.47

Krome, estas notinde ke Andy Künzli ricevis de SES entute CHF 10'000.- por sia redakta laboro.

21.02.2009 / Hans-W. Grossmann

Konkurso por lernantoj de Esperanto

Alvenas la momento publike anonci la konkurson, kiu celas, krom varbi novajn esperantistojn, informi pri la internacia lingvo, montri, helpe de la medioj de Svislando, ties vivantan movadon, utiligajn eblojn en la tutmonda kontaktado.

Nun okazas la finpretigo de la agado: redaktado de la konkursa enhavo plenumenda fare de la kandidatoj, ekzamenaj (skriba kaj parola partoj) kriterioj kaj demandoj, kreado de diversaj anonc-manieroj kaj -medioj (tutpublikaj kaj universitataj gazetoj, retaj informadoj: SES, Ipernity, blogoj, facebook kaj aliaj, flugfolio, eventuala pretigo de varbfilmeto, diskoj CD aŭ DVD)

La publika anonco okazos kadre de gazetara konferenco kaj per gazetara komuniko. Retejo estas kreata pri la konkurso, kiu havos siajn adresojn kaj enhavon en la lingvoj esperanta, franca kaj germana:

www.esperanto-konkurso.ch

www.concours-esperanto.ch

www.esperanto-wettbewerb.ch

La ekzameno de la kandidatoj okazos en Lenk, dum SFERO, la familia renkonto organizata de nia estrarano Nelida Weidmann. Dato kaj horaro: sabato, la 17-a de oktobro 2009, 10h00-12h00 kaj 14h00-16h00. La transdono de la premioj okazos je la 20-a horo dum

la distra vespero de la evento. La antaŭvidataj ekzamenantoj de la kandidatoj estas Mireille Grosjean, Monika Molnár kaj Stefano Keller, kiuj jam plenumis tian taskon dum la ekzamenoj de la konkurso de La Stelo.

La akireblaj premioj estos:

1-a premio: Fr. 500.00 + partopreno en la Novajara Renkontiĝo en Germanio (NR), 2-a premio: Fr. 200.00 + (NR), 3-a premio: Fr. 100.00 + (NR). 4-a ĝis 10-a premioj: ekzemplero de la Enciklopedio. La kandidatoj partoprenantaj en la konkurso ricevos etan memoraĵon. Ĉiu kandidato kiu atingas la etapon de la ekzamenoj, ricevos atestilon pri sia partopreno, laŭ sia nivelo.

La estraro de SES opinias ke tiuj personoj, kiuj interesiĝas pri esperanto, meritas la daŭran disponigon de subteno, konsilado, kursoj kaj aranĝoj fare de membroj kaj institucioj de la esperanta movado. Tial tre gravas la efektivigo de la plua kontaktado kun la interesataj kandidatoj ankaŭ post la konkurso, sendepende de ilia sukceso en la ekzamenoj.

La retejo de la konkurso baldaŭ estos vizitebla kaj ni kalkulas kun la apogo de niaj membroj, kio povas efektiviĝi en formo de informado pri la evento. Dankon por via kunlaboro!

Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia

Bibliothèque de la Ville, Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds

Tel. : 032 967 68 42.

Retadresoĵ : claude.gacond@ne.ch, martine.schneller@ne.ch, nancy.fontannaz@ne.ch

Venontaj stud-aranĝoj !

Didaktika stud-sabato okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj. Instruas Monika Molnar, Nancy Fontannaz kaj Luc Allemand. Rezervu la sekvajn sabatojn :
septembre 26, oktobre 24, novembre 21 kaj decembre 12 :

interaktiva zamenhofa festo.

Detala informilo franc- kaj germanlingva, akompanos la bultenon *SES informas* 2003, alportanta ĉiujn utilajn klarigojn. Ĝi devus instigi la organizon de karavanaj grupaj partoprenoj al tiuj efikaj stud-sabatoj kaj la diskonigon de tiu perfektiga studieblo de esperanto al ĉiuj kursanoj.

-oOo-

Esperanto-Amikaro de CDELI

Kreo de la Asocio de Amikoj de CDELI

La informado kaj alvoko pri la kreo de Asocio de Amikoj de CDELI (Association des Amis du CDELI), kiuj estis dissenditaj fine de novembro 2008 dank'al la diskoniga kunlaboro de SES, ricevis tre kuraĝigan apogon. Per sendo de kotizoj 30-frankaj tuj sin anoncis 31 Amikoj de CDELI jam en 2008 kaj la listo de la Amikoj por la jaro 2009 jam listigas 15 personojn.

Nuna listo de la Amikoj de CDELI

Tiuj kontribuintoj baldaŭ ricevos raporton kun la kunvoko al la fondaj kunvenoj de la 15-a kaj 16-a de majo. Ili estas: Carlo kaj Dorothee Baumgartner en Meyrin, Sonia Bétrix en Travers, Andres kaj Camille Bickel en Genève, Anke Brouwer en La Chaux-du-Milieu, David Buhlmann en Prilly, Tazio kaj Teresita Carlevaro en Bellinzona, Sonia Chatelan-Daubercies en Lausanne, Raoul Cop en La Chaux-de-Fonds, Dominique kaj Elisabeth de Mestral-Dubuis en Etoy, Nancy Fontannaz en Pully, Georgette Friedli en Bernex, Andrée kaj Claude Gacond en La Chaux-de-Fonds, François Gacond en Neuchâtel, Walter Peter Gaxer en Lausanne, Ernst kaj Ruth Glätli-Suter en Brugg, Bruno Graf en Ittingen, Moreno Graneroli en Origlio, François Grin en Genève, Ueli Haenni en Zollikofen, Irmi kaj Reinhard Haupenthal en Malaucène (Francio), Emmanuelle

Houlmann Tschachtli en Bern, François Huguenin en La Chaux-de-Fonds, Marc Humbert-Prince en Bevaix, Yvette Humbert Fink en Yverdon-les-Bains, Stéphane Keller en Lausanne, Barbara Loepfe en Zürich, Verena Mallepel en Minusio, Hans Meier en Basel, Marie-Louise Mürger en Môtiers, Eduard kaj Ruth Muster en Ecublens, Bernard kaj Claire Nicolet en Commigny, Willy Nüesch en Bern, Nicole Piron en Gland, André Sandoz en La Chaux-de-Fonds, Marcus Sanz en St. Cergue, Martine Schneller en Neuchâtel, Richard Schneller en Wittenbach, Adrian Tanner en Dotzingen, Jean-Thierry Von Büren en Savagnier, Vera Zaslowski en La Chaux-de-Fonds.

Malavara donacemo

Por la periodo de la 12a de novembro 2008 ĝis la 31a de decembro la sumo de la kotizoj atingis Fr 930.- kaj aldone la donacoj sumis Fr 3'695.- Por la jaro 2009 aldone al la kotizoj de po Fr 30.- de la 15 Amikoj, la donacoj sumas Fr 3'347.25. Tiel la Asocio en kreado povis ekplenumi sian financon ralon favore al la daŭrigo de la katalogado de la libroj de CDELI fare de la bibliotekistino Martine Schneller kaj al la kreo de la retejo www.CDELI.org fare de Stéphane Keller.

Pri la libro-servo kaj brokanta servo

Claude Gacond senŝulde transdonis al la Esperanto-Fako de la Asocio la Libro-Servon, kiun li kreis serve al la frekventantoj de CDELI dezirantaj aĉeti librojn. Nancy Fontannaz, kiu prizorgas tiun servon, efektivigis ĝian inventaron. La valoro de tiu vendebla libraro, malpliigita de triono kiel kutime estas por vendota librostoko, eniris la librotenanadon per sumo de Fr 15'000.- Siaflanke la brokanta servo, kies rolo estas la riĉigo de la kolektoj de CDELI per la vendo aŭ interŝanĝo de duoblaĵoj, eniris la librotenanadon per simbola sumo de Fr 200.- Nia dankemo iras al Sonia Béatrix-Koleva, la librotenisto de la Asocio.

Kunvoko al la fondaj kunsidoj de la 15-a kaj 16-a de majo

Ĉiuj Amikoj de CDELI, kun la kunvoko al la fondaj kunsidoj okazontaj franclingve la vendredon 15-an de majo ekde la 17h00 kun aperitiva kunkludo je la 18h00 kaj esperantlingve la sabaton 16an de majo ekde la 10h30 antaŭ la Asembleo de SES, ricevos detalan raporton pri tiu librotenado kun la definitiva tagordo de ambaŭ fondaj kunsidoj, kiuj fakte oficialigos la ekziston de la Asocio de la Amikoj de CDELI (Association des Amis du CDELI) kaj de ties Esperanto-Fako.

Kiuj ne kotizis ĝis nun kaj tamen ŝatus ĉeesti unu aŭ ambaŭ kunvenojn kun voĉdonrajto, tiuj nepre sendu kiel eble plej rapide sian jarkotizon de Fr 30.- al la poŝtkonto 10-227495-0 de Amis du CDELI – Esperanto-Amikaro de CDELI, 2300 La Chaux-de-Fonds. Observantoj sen voĉdonrajto estas bonvenaj en ambaŭ kunvenoj.

Tuj kiam la Asocio de la Amikoj de CDELI fakte reale ekzistos per la akcepto de sia statuto kaj la elekto de sia Komitato, tiam ĝi povos ekagi cele al kreo de apogantaro konsistanta el kulture kaj politike gravaj personecoj kaj al akiro de financaj apogoj. Tiuj agadoj celos firmigi la situacion mem de CDELI kadre de

la Biblioteko de La Urbo La Chaux-de-Fonds kaj inter la kulturaj institucioj de la Neŭŝatela Ŝtato.

Nome de la provizora komitato: Claude Gacond kaj Nancy Fontannaz.

-oOo-

Atentigo pri tri gravaj sabataj renkontoj okazontaj en CDELI, La Chaux-de-Fonds

Dum la feria periodo ne okazos studaranĝoj en CDELI, sed interesaj renkontoj. Kiuj ne forestos fericele, tiuj nepre profitu tiujn 3 okazojn por unue veni aŭskulti Mireille Grosjean raporti pri siaj vojaĝoj en Afriko kaj Azio renkonte al esperantistoj. La tria aranĝo celebros la cent-kvindekan naskiĝan jubileon de L. L. Zamenhof. Tiu renkonto kun koncerto atestu pri la nuna dinamismo kultura de la svisa esperanto-komunumo.

Mia vojaĝo en Azio

Mireille Grosjean

Sabaton 27an de junio

Mireille Grosjean raportos pri sia multmonata vojaĝo en Azio : Dum la matenaj prelegaj momentoj ŝi reliefigos la turismajn aspektojn de sia migrado en Azio kaj posttagmeze ŝi raportos pri la esperanto-vivo en la vizititaj aziaj landoj.

Horaro :

10.00 : Malfermo de la CDELI salono kun eblo aĉeti librojn, babili kaj kafumi.

10.30 : Unua prelega momento.

11.15 : Kafuma paŭzo.

11.45 : Dua prelega momento.

12.30 : Komuna tagmanĝo.

14.30 : Tria prelega momento.

15.15 : Paŭzo.

15.30 : Kvara prelega momento.

16.15 : Konkluda teumo kaj amika babilado, libroservo.

17.30 : Oficiala fermo.

(Monkolekto por la kovrado de la organizaj kostoj.)

-oOo-

Mia vojaĝo en Benino

Mireille Grosjean

Sabaton 22an de aŭgusto

Mireille Grosjean rakontos pri sia restado en Benino. Ŝi havas multajn fotojn pri sia restado en tiu afrika lando kaj pri siaj kontaktoj kun esperantistoj. Kaj ŝi proponos interesan ekzercon pri afrika lingvo.

Horaro :

10.00 : Malfermo de la CDELI salono kun eblo aĉeti librojn, babili kaj kafumi.

10.30 : Unua prelega momento.

11.15 : Kafuma paŭzo.

11.45 : Dua prelega momento.

12.30 : Komuna tagmanĝo.

14.30 : Tria prelega momento.

15.15 : Paŭzo

15.30 : Kvara prelega momento.
16.15 : Konkluda teumo kaj amika
babilado, libroservo.
17.30 : Oficiala fermo.

(Monkolekto por la kovrado de la
organizaj kostoj.)

-oOo-

Kultura Festo

**koncerto, recitoj kaj prelegoj
honore al L. L. Zamenhof
naskiĝinta antaŭ 150 jaroj**

Sabaton 5an de septembro

**CDELI - Biblioteko de la Urbo
La Chaux-de-Fonds, Progrès 33**

10.00 : Malfermo de la salono de
CDELI kun eblo aĉeti librojn, babili
kaj kafumi.

11.00 : Malfermo de la Aŭlo.


11.30 : En la Aŭlo **koncerta recitalo**
de Elisabeth de Mestral. Repertuaro
el melodioj de komponistoj vivintaj
en la epoko de Zamenhof: varia
programo el kantoj romantikaj kaj
humuraj en esperanta versio
grandparte de Dominique de
Mestral.

13.00 : **Bufedo.**

14.30 : En la Aŭlo : **Recitoj kaj
prelegoj.**

**La definitiva programo de tiu festa
kunveno aperos en la bulteno SES
informas 2009-3** dissendota ekde la
15-a de aŭgusto, sed jam nun rezervu
la daton de la 5-a de septembro en
via agendo por povi digne kunfesti la
150an naskiĝjaron de la aŭtoro de
esperanto L. L. Zamenhof.

-oOo-



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 178, 4005 Basel

Tel. : 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj : 20.00 en la kelo de la
malantaŭa domo, Riehenring 129.

esperantobasel@gmx.ch

Venontaj kunvenoj

Maje 28: Filmo *Gerda malaperis*.

Junie 25: Grün'80.

Julie 9 aŭ **16:** Salat-bufedo ĉe
familio Focke.

Aŭguste 23: Ŝipveturada ekskurso al
Rheinfelden.

Septembre 24: Ĉiu parolas pri siaj
ferioj.

Oktobre 22: Legado – legaĵoj.

Novembre 26: Venonta programo.

Decembre: Zamenhofa festo.

-oOo-

Bern

Abiturienta laboraĵo de Tanja Zbinden

Ne malofte okazas, ke gimnazianoj elektas esperanton kiel abiturientan temon. Tanja Zbinden el Rüfenacht (Gimnazio Köniz-Lerbermatt), kiu ĉeestis matene la jarkunvenon de 2007 en Berno, esploris pri la evoluado kaj la ŝancoj de esperanto. Ŝi ŝatas fremdlingvojn, ĉefe la italan, kaj en la jaro de la lingvoj 2008 ŝi deziris verki pri lingva temo. En interreto ŝi malkovris esperanton kaj la movadon.

La laboraĵo estas klare strukturita. La gimnaziano deziris konatiĝi kun la internacia lingvo esperanto, ties iniciatinto, la celoj, la disvastiĝo kaj la problemoj. Ŝi volis trovi respondon al la demando: « *Ist Esperanto gescheitert?* » (Ĉu esperanto fiaskis?). Ŝi rimarkas, ke ne ekzistas multe da dokumentaro en la germana lingvo. Multo troveblas en interreto, sed ĉefe en esperanto kaj ne ĉio estas fidinda.

La verkaĵo ankaŭ enhavas ĉapitrojn pri esperanto en Svislando, la eksperimento de Paderborn, esperanto sub Hitler kaj Stalin kaj la angla kiel mondlingvo. Je la fino estas aldonita intervjuo kun Bruno Graf.

Tanja Zbinden tiras ankaŭ por ni interesajn konkludojn, jen kelkajn :

Esperanto disvastiĝis spite de kontraŭaj naciaj interesoj kaj militoj, pluevoluis kaj estas por multaj homoj vivanta lingvo. La plu-

disvastiĝo stagnas pro la hegemonio de la angla kaj la Eŭropa Unio favoras la multlingvecon.

« *Mi, Tanja Zbinden, povus bone imagi, ke esperanto estus instruata en la lernejoj. Ĉu iniciato favore al esperanto estus politike sensukcesa?*

« *Ĉu do esperanto fiaskis? Mi kredas ke ne, ĉar ene de 121 jaroj la junulverko de Zamenhof montriĝis kiel funkcia lingvo* », skribas la junulino.

Bruno Graf

PS : Tiu abiturienta laboraĵo estas skribita en la germana lingvo, nombras 34 paĝojn en formato A4 kaj estas deponita en CDELI. Interesatoj turnu sin al Bruno Graf, kiu posedas personan ekzempleron.

-oOo-

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 734, 1212 Grand-Lancy 1

Tel. : 022 771 24 37

La kunvenoj okazas en Maison des Associations, rue des Savoises 15.

Instruado de esperanto en malgranda lernejo

Kvankam mi tro malofte ĉeestas ĉu en ĝenevaj ĉu en ĉaŭdefonaj renkontiĝoj, mi tamen daŭre legas, informiĝas kaj interesiĝas pri esperanto.

La pasintan aŭtunon, post prezento de la lingvo al miaj gelernantoj, ili petis al mi organizi nedevigan kurson. Mi unue rezignis pro la troa laboro kaj la neebleco gvidi la kurson je komforta horo. Post kelkaj

semajnoj ili repetis tion, kaj mi respondis, ke la sola libera momento estus je vendredo post la kursoj. Pro ilia insisto mi demandis al la lernejestro, ĉu eblus organizi la kurson, kaj li jesis. Mi do tuj anoncis, ke estas eble enskribiĝi al tiu kurso. Kaj, malgraŭ la malfavora horaro, mi ricevis 23 aliĝojn (do pli ol 10% de la lernantaro - ni havas etan lernejon) ! Tiom, ke mi devis duobligi la kurson. Do, mi ekinstruos vendrede. Mi ne scias, ĉu multaj lernantoj forlasos la kurson post la unuaj lecionoj aŭ ĉu mi povos lernigi ilin ĝis la somero. Mi ankaŭ ne scias, ĉu miaj lingvaj kaj didaktikaj konoj sufiĉos por efike instrui la lingvon. Sed estas jam ia sukceso antaŭ ol komenci !

Julien Nicolet

-oOo-

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel: 021 647 29 28

076 411 14 55

esperanto@citycable.ch

ccp 10-26785-8

<<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon en la monato je la 20.00.

Komitato : Prezidanto : David Bühlmann
Tel. : 021 624 36 38 ; Vicprezidanto :
Stéphanie Strappazon 079 415 33 16 ;
Sekretario : Francisko Randin 076 411 14
55 ; Kasisto : Sonia Daubercies, 079 649 88
86.

Venontaj kunvenoj

Maje 4 : Venu kun viaj demandoj, lingvaj problemoj, ni provos respondi al vi. Venu kun viaj mal-

kovraĵoj, lingvaj kuriozaĵoj, vi prezentos ilin al ni.

Junie 13 (sabato) : Ekskurso.

Septembre 7 : Programo decidota.

Oktobre 5 : Programo decidota.

Novembre 2 : Programo decidota.

Decembre 12 : Zamenhofa Festo.

2010 Januare 4 : Progr. decidota.

Februare 1 : Ĝenerala Asembleo.

Marte 1 : Programo decidota.

-oOo-

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj :

Restoracio Bären, Flecken 11, Rothenburg.

Restoracio Bellini (hotelo Continental-Park), Murbacherstr. 4. Tel.: 041 228 90 50

Ĉe gesinjoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel. : 041 210 25 88.

Venontaj kunvenoj

Maje 6 (merkredo) ĉe Rey : 14.00 :

Paroliga leciono kun Paul Scherer, 14.30: **La societo de la vapor-ŝipamikoj** kun Kony Rey.

Junie 3 (merkredo) ĉe Bellini : 14.00-16.00 **Konversacia rondo** kun Sonja Brun.

Julie 1 (merkredo) ĉe Rey : 14.00 : **Paroliga leciono** kun Paul Scherer, 14.30 : Ludado kun Sonja Brun (ĉiu prezentu ludon).

Aŭguste 7 (vendrede) **Vespera promenado** kun Koni Rey (la koncerna programo estos anoncita).

Septembre 2 (merkredo) ĉe Bellini : 14.00-16.00 : **Konversacia rondo** kun Sonja Brun.

Oktobre 7 (merkrede) ĉe Rey :
14.00 : **Paroliga leciono** kun Paul Scherer, 14.30: **William Auld kaj La infana raso** kun Sonja Brun.

Novembre 4 (merkrede) ĉe Bellini :
14.00-16.00 : **Konversacia rondo** kun Sonja Brun.

Decembre 2 (merkrede) ĉe Rey :
14.00 : Zamenhofologio kaj pretigo de la programo 2010 kun Paul Scherer.

2010 Januare 6 (merkrede) ĉe Bellini : 14.00-16.00 : **Konversacia rondo** kun Sonja Brun.

-oOo-

Wil

Esperanto-Klubo Wil (Orientvislando)
www.esperanto.ch/wil

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder, Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel. : 071 393 41 49. chaves-walder@bluewin.ch kaj Wolfram Fischerm Steigstrasse 12, 9116 Wolfertswil. Tel. : (P) 071.390.04.48 (O) 071.390.04.44. Fax : 071.390.04.47.

Kunvenoj : La esperantistoj kunvenas ĉiun unuan merkredon en la monato vespere inter la sepa kaj la naŭa en la b'treff en Flawil situanta en la iama stacidomo.

Venontaj kunvenoj

Maje 6 : Provleciono en Flawil.

Junie 3 : Prelego: La metio de grafolo (demandoj kaj respondoj). (Ĉekomence rakonta rondo.)

Julie 1 : Tradicia vizito de la turo de Wil.

Aŭguste 16 : Tuttaga ekskurso al Winterthur.

Septembre 2 : Impresoj kaj travivaĵoj de la Universala Kongreso en

Bialistoko. (Ĉekomence rakonta rondo.)

Oktobre : (Neniu renkontiĝo.)

Novembre 5 : Gastprelego: Kiel gasto en Benino, Koreo kaj Japanio (demandoj kaj respondoj). (Ĉekomence rakonta rondo.)

Decembre 2 : Fonduovespero kun poemoj, rakontoj, kantoj.

-oOo-

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Adreso: Archstrasse 2, 8610 Uster.

Poŝtadreso: Poŝtkesto 858, 8034 Zürich.

Poŝtkonto: 80-17287-1

Esperanto-Societo Zuriko

renkontiĝas nun denove en Centro

**“Karl des Grosse, Kirchgasse 14,
8001 Zürich.**

Venontaj kunvenoj

Maje 8 (vendredon) 19.00-22.00.

Septembre 26 (sabaton) 19.00-22.00. Publika evento pri la Eŭropa Tago de la Lingvoj.

Decembre 11 (vendredon) :

Zamenhoffesto kun aperitivo kaj manĝaĵoj.

Informojn pri la aktuala

programo de Esperanto-Societo

Zuriko vi trovas en la reto sub:

www.esperanto.ch/zuriko/programo.ht

[zuriko@esperanto.ch /](mailto:zuriko@esperanto.ch)

<http://esperanto.ch/zuriko>

-oOo-

Mortoj

Hans Altherr

1914 - 2007

La 12an de junio 2007 forpasis Hans Altherr. Li naskiĝis en Taufen en 1914, esperantiĝis en 1964 en Genève partoprenante la kurson, kiun tiam gvidis Anita Mase veninta el Zürich. Hans edzinigis ŝin, kaj, ĉar la paro uzis esperanton hejme, tiel Zora, la filino de Anita, ankaŭ lernis esperanton. Dum tri jaroj Hans prezidis la lokan klubon « La Stelo » Estas sub lia prezido, ke ekeldoniĝis hektografie la bulteno *Brasikfolio*, kies redaktanto estis Anita Altherr. Modela geedza kunlaboro.

Odette Fregonara

15.05.1922 – 14.11.2008

Odette Fregonara naskiĝis la 15-an de majo 1922 en la franca urbo Nice, kie ŝi frekventis la lernejojn, lernis esperanton kaj fakiĝis kiel kudristino. Laborcele ŝi instaligis en Svislando kun sia fratino, kiu malfeliĉe baldaŭ subite mortis. Tre fervore kaj aktive ŝi partoprenis la tiamajn laboristajn luktojn cele al pli da egaleco, libereco kaj justeco.


Edziniĝinte ŝi naskis du infanojn : Claude kaj Monique. Tiam ŝi la kudristan laboron plenumis hejme, kio donis al ŝi la eblon vivi proksime de siaj infanoj. La tuta familio intimiĝis kun esperanto, ĉar Odette Fregonara ofte gastis esperantistojn en vizito aŭ deĵoro en Ĝenevo. Ŝi baldaŭ fariĝis UEA-delegitino plenumante sian funkcion kun plezuro, ĉar ŝi ŝatis amikiĝi kun la esperanto-vizitantoj. Ankaŭ aktivege ŝi partoprenis la lokan esperanto-vivon vigligante grupajn kunvenojn, kiam ŝiaj patrino kaj kudristino aktivecoj tion ebligis. Ŝi fariĝis komitatano de la Grupo « La Stelo » de 1967 ĝis 1979, kun funkcio de vicprezidanto en 1978 kaj 1979. En la Grupo ŝi entuziasme raportis pri siaj vojaĝoj.

Ŝiaj infanoj donis al ŝi tri nepojn, al kiuj ŝi transdonis sian vojaĝemon, organizante por ili specifajn vizitojn. Kun unu el tiuj nepoj antaŭ nelonge ŝi ĝoje revidis la kvartalon de sia infaneco en Nice.

Je la aĝo de 86 jaroj, suferanta pro fortaj tensiaj variadoj, ŝi estingiĝis hejme la 14an de novembro 2008. En ĉies memoroj ŝi restos kiel persono varmkora, entuziasma helpema, kaj malavare gastema.

Mi, Claude Gacond, mem spertis ŝian helpemon, kiam mi laboris en Ĝenevo por esperanto en la « Foire de la Paix » okazinta de la 9-a ĝis la 14-a de novembro 1970. Ŝi helpis min por pretigi la esperanto-standon, por funkciigi ĝin tutan semajnon de frumatene ĝis meznokte, kaj eĉ poste por ordigi la materialon. Tiajn efikajn helpojn meritas esti rememorigitaj.

Claude Gacond kaj Arlette Di Vetta.



Kongresen

Dek-du tagoj survoje al Roterdamo per biciklo Luc Allemand

Daŭriga raporto

1a parto en *SES informas* 2008-4 : Pretiĝo kaj foriro la 6an de julio 2008.

2a parto en *SES informas* 2009-1 : 2a, 3a kaj 4a tagoj.



Luc Allemand sur sia biciklo.

Jaŭdon 10an de julio : 5-a tago

Hodiaŭ estos mallonga etapo ĝis Dienheim, iu vilaĝeto 20 km sude de Mainz. Mi do profitas dormi ĝis 9h30, kaj trankile matenmanĝas en

la ĝardeno kun Mirjam. Estas bela kaj varma tago.

Malgraŭ ĝia mallongeco tiu etapo ne fariĝas la plej facila. Provante eviti ĉefan autoŝoseon mi alveturas

sur kampa vojaĉo, kaj alvenante aliflanke de la kampo la vojo, kiu farigis ankoraŭ pli aĉe ŝtona kaj trua, T-dudirektiĝas. Pli-malpli hazarde mi elektas la maldekstron, sed rapide eĉ maleblas antaŭeniri per la biciklo, ĉar iom grimpas.

Ĉu vere estis bona ideo eniri tiun kampon? Eble ne, sed tamen mi esperas alveni ien, al iu pli agrabla vojo. Sub terura varmego mi marŝas puŝante mian pezan biciklon. Post tempo, kiu ŝajnas al mi longega, la vojo finiĝas. Ne eblas daŭrigi en tiu direkto. Mi preskaŭ senkuraĝiĝas, sed tiam mi diras: *Ne, mi ne povas cedi! Dio donu al mi energion kaj kuraĝon; tion li tute kapablas.* Mi suferas pro varmo, jes, sed eltenblas. Mi perdiĝas en tiu kamparo, sed fakte ne veras, ĉar sufiĉos, ke mi konsentu eliri, kiel mi eniris, kaj ke mi serĉu alian vojon. Tempo neniam perdatas, kaj plie tempon hodiaŭ mi havas.


Kun kuraĝo mi do reiras ĝis la T-kruĉiĝo kaj provas la dekstran vojon, kiu iom pli facilas. Sed rapide mi vidas, ke ankaŭ tie mi alvenas nenien. Mi do finfine reiras ĝis la lasta vilaĝo kaj post iomete da serĉado trovas tre bonan biciklovojon kelkajn metrojn apud la aŭtoŝoseo.

Mi soifas kaj mia botelo malplenas! Sed ŝanco estas kun mi: jen je mia dekstro plantejo kun laborantoj, kie ili verŝajne havos akvon. Unu el ili tuj iras al dometo kaj revenas kun granda akvobotelo. Mi ne volas kunpreni tiun pezaĵon, mi do malfermas mian biciklan botelon kaj li verŝas akvon enen. Mi ĝue tuj trinkas la du trionojn, kaj replenigas

ĝin. Ĉi foje kuraĝon kaj ĝojon mi vere retrovis!

Veturante trankvile inter vitejoj mi alvenas fine de la posttagmezo en Dienheim. Post mallonga serĉado mi trovas la domon de Christine Kopitek. Mi sonorigas kaj Christine aperas rapide sur la peronon. Ŝi ŝajnas ne scii, kiu mi estas, mi do alparolas ŝin esperante: *«Ho jes, pardonu, mi tute forgesis vian alvenon! Sed eniru!»* ŝi diras finfine.

Dienheim estas nur domareto sen io alia ol loĝejoj, sed tuj kelkaj minutoj pli fore staras sur monteto alia vilaĝo pli granda: Oppenheim. Estas nur la 17-a horo kaj kvarono, mi do havas ĉi-foje tempon, kaj decidas iri viziti tiun vilaĝon.



En la vilaĝo Oppenheim

Tie mi vizitas la katedralon, manĝas glaciaĵon kaj aĉetas poŝtkartojn.

Reveninte al Dienheim mi skribas en la ĝardeno dum Christine okupiĝas pri siaj rozoj kaj arbetoj. Mi ankaŭ remetas la ĉenon de la biciklo de iu el ŝiaj du infanoj.


Dum la vespermanĝo la du knaboj provas kompreni, kion ni diras, kaj ridas de nia esperanta babilado. Ili fakte ne lernis nian lingvon.

Vendredon 11an de julio : 6-a tago

Hodiaŭ estos la plej longa etapo de mia vojaĝo, tio estos multe pli longa, ol mi imagis. Sub pluvo mi forlasas Dienheim je la 8h40 kaj haltas en Oppenheim por aĉeti trink-jogurton. Tra montetoj kaj diversaj vilaĝoj mi evitas Mainz, kaj retrovas Rejnnon en Bacharach, bela turisma vilaĝo, kies nomon mi skribas en mia kajero por ne forgesi ĝin.

Daŭre mi sekvas la indikojn de la biciklovojaj ŝildoj. Norde : St. Goar : 2h30. « Bone, Sankt-Goar legeblas sur mia mapo, mi veturos tien. »

Alia biciklanto veturas nun apud mi. Ni kune babilas ĝis la sekva vilaĝo, kien li iras labori. Survoje ni vidas turon ĵus borde de la riverego. Li klarigas al mi, ke tio estas "Mäuserturm", (musturo) tio estas kontroleja turo, el kie oni vidis kaj pagigis la ŝipistojn dum Mezepoko.



Mäusertum kaj Rejno

Ju pli mi antaŭeniras, des pli la montetoj multiĝas kaj altiĝas, kaj tiel, post kelkaj horoj mi alvenas en belegan kaj faman regionon : tiu de Lorelei. Laŭ legendo Lorelei estis bela virino, kiu sidis sur iu roko super Rejno.

Sur la montetoj staras pluraj kasteloj, kaj mi memoras, ke en unu

el ili okazas rakonto de la komiksa serio "Yoko Tsuno". Mi ankaŭ rekonas trajno-tunel-enirejon, kiu desegnitias en tiu komikso.

Sankt-Goar estas la plej grava vilaĝo (fakte ĝi estas pli-malpli la sola) de la Lorelei-a regiono. Kvankam jam la posttagmezo baldaŭ finiĝos, kaj longa vojo ankoraŭ restas veturota, mi ne rezistas je la emo halti kaj aĉeti poŝtkartojn.

« Sed kie mi lasu mian biciklon kun miaj bagaĝoj en tiu turisma ejo, dum mi eniros magazeno ? » Tiam, ĵus apud la celita magazeno, en mallarĝa strateto, floristino diras, ke mi povas lasi ĝin tie, en sekuro, ke ŝi okulumos al ĝi.

La riverego longe meandras inter la montoj en bela pejzaĝo. Verŝajne mi ne havas elekteblon : kvankam ne estas ĉiam la bona direkto por mi, mi devas ĝin ĉiam sekvi, farante eĉ la kromiron preter Koblenz. Kvankam la montoj ne estas altaj, verŝajne nenia vojo transiras ilin. Mi estas enprizonigita kun Rejno. Havi riveregon kiel prizonkolegon, jen stranga ideo !

Nokto venas, kiam mi atingas Sinzig. Finfine la montoj trankvile platiĝis, kaj bicikla ŝildo indikas maldekstren Bad-Neuen-Ahrweiler : la urbeton kie esperantistoj atendas min. La biciklovojo sekvas rivereton. Mi telefonas al Wolfgang Bohr por pardonpeti, ke mi alvenos nur malfrue, por ke ili ne timu. « Nenia problemo, li diras, ni atendas vin. Kaj kiam vi alvenos en Bad-Neuen-Ahrweiler, se vi ne trovos la domon, retelefonu kaj mi venos serĉi vin ! »

Nun vere noktas; mi bezonos mian lampon ĉefe por legi la ŝildojn. Sed fie, mia lampo ne ŝaltiĝas, kaj sen lumo mi ne povas ĝin ripari !

Tamen mi senprobleme, eĉ senlume, alvenas en la urbon. Laŭ mia mapo ŝajnas facile trovi la hejmon de familio Bohr. Sed en realo tute ne estas tiel, plie en nokto, kaj post serĉado, turnado, perdiĝo, mi forlasas esperon mem trovi tiun hejmon kaj finfine vokas mian gastigonton.

Post kelkaj minutoj li alvenas piede kun sia hundino Joŭla. Fakte mi ne estis for. Estas nun 23h30.

Alvenante ni kuŝigas mian biciklon en duoblan ascendeblan remizon, sub aŭtomobilon. Gesinjoroj Bohr konservis por mi salaton, panon, fromaĝon kaj sekan viandon. Malgraŭ la meznokta horo ili afablege restas kun mi por babili momenton. Sed pro mia lacego, kiun mi vere sentas nur nun, mi nur manĝas iomete da salato kaj iras rapide dormi.

Endormiĝante mi pensas : « *Kia aventuro ! Feliĉe morgaŭ mi povos longe dormi ; ĉar mi ĝuste programis resti unu tagon ĉi-tie por ripozi. »*

Sabaton 12-an de Julio : 7-a tago : tago de ripozo.

Verŝajne mi ne bone fermis la rulkurtenon, ĉar jam je la 8a horo matene mi vekiĝas pro la suna lumo. Trankvile mi duŝiĝas, matenmanĝas, skribas la poŝtkartojn de Sankt-Goar, kaj Torben, la filo de Wolfgang, veturigas min al la poŝtoŭficejo, por ke mi sendu ilin.

Antaŭ ol komenci mian vojaĝon mi parolis pri tiu projekto al kelkaj

amikoj el mia preĝejo. Unu el ili estas Pierre-Alain, kiu sin proponis por preĝi por mi dum mia aventuro. Tion li faras regule kaj hieraŭ li sendis sms-mesaĝeton al mi, por demandi ĉu ni povas paroli telefone : Li interesiĝas scii, kiel funkcias mia vojaĝo, kiel mi fartas ? Hieraŭ ni ne povis telefoni pro mia malfrua alveno, sed hodiaŭ mi havas tempon. Mi do telefonas al li.

Post la tagmanĝo ĉirkaŭ je la 15-a horo alvenas Lara, la fratino de Torben. Ŝi laboras en panejo kaj alportas prunkukon, kiun ni manĝas kun kafo.

Wolfgang kun sia filino Lara vizitigas al mi la malnovan urbon de Ahrweiler. Ĉe ĉiu pordo staras turo kun statuo de sanktulino.



En Ahrweiler

Hodiaŭ vesperè venas gastoj ĉe familio Bohr por la vespermanĝo : Maret, la granda fratino de Lara kaj de Torben, kun sia edzo Till, kaj la

gepatroj de ĉi-lasta. Ili alportas bon-
gustegan ĉerizan deserton. Torben
kuiras viandon en la ĝardeno.



Torben rostanta viandon

Dum la pretigoj mi rapide iras al la
apuda magazeno por aĉeti mian
morgaŭan tagmanĝon.

Vesperumante ni ĉefe parolas
germane, ĉar la gastoj ne parolas
esperanton. Tial mi ne ĉion kom-
prenas kaj preferas enlitiĝi ne tro
malfrue.

Dimanĉon 13an de julio : 8-a tago

Mia sekva etapo Aachen espereble
ne estos for same kiel la lasta.
Tamen hieraŭ oni diris, ke estos
sufiĉe fore. Mi vekigis je 7h30, kaj
je 8h40 ni ascendigas la duoblan
remizon, por ke mi reprenu mian
biciklon el ties suba parto. Kun la
helpo de Wolfgang mi refiksas miajn
biciklosakojn.

Al Wolfgang kaj al lia edzino mi
diras ĝis revido, ĉar verŝajne mi re-
vidos ilin post kelkaj tagoj en
Roterdamo.

Lastjare mi feriiis dum dek tagoj ĉe
amikoj, kiuj loĝas en Oberdress,
vilaĝo apud la urbo Rheinbach
proksima de Bonn. Tiam mi veturis
per trajno kaj mi preskaŭ nenion
vidis dum tiu unutaga vojaĝo. Mi
simple alvenis en la stacidomon kaj

ili venis min akcepti per aŭtomobilo.
Kaj nun post sep tagoj de biciklado
mi tute hazarde kaj surprize (fakte la
surprizo jam montriĝis, kiam mi
studis la mapojn) alvenas ekzakte en
Rheinbach.

Antaŭ unu jaro, dum mi feriiis ĉi
tie, mi venis ĉiutage en la urbon ĉe
junulino nomata Natacha, kiu donis
al mi kursojn de la germana lingvo.
Nun mi decidas retrovi la domon de
Natacha por iri saluti ŝin.

Unue mi devas orientiĝi : Ĉi-foje
mi scias, kie estas la nordo, sed last-
jare en tiu urbo mi eĉ ne sciis tion.
Kun emocioj mi pli kaj pli rekonas la
stratojn kaj rapide alvenas al tiu de
Natacha. Mi haltas antaŭ ŝia domo
kaj iras ĝis ŝia perono, sonorigas.
Neniu ! Mi rigardas la etiketon :
nenia nomo ! Kaj ĉe nenia alia pordo
legeblas ŝia nomo ! Mi atendas
momenton. Ĉu ŝi simple ne estas
hejme nun ? Ĉu ŝi translokiĝis ? Mi
neniam scios. Bedaŭre mi daŭrigas
mian vojon.

Iom poste mi alvenas en Oberdress
mem. Mi scias, ke miaj amikoj ne
estas hejme ĉi semajne, sed tamen
mi volas retrovi ilian domon. Sur el-
ŝirita paĝo de mia kajero mi skribas
mesaĝon por ili kaj donas ĝin al la
najbaro, la patro de mia gastiginto.

Posttagmeze, inter Euskirchen kaj
Zŭlpich, preterveturante biciklantan
mezaĝan virinon mi demandas al ŝi :
« *Kiun direkton por Aachen ?* »
« *Tien, ŝi respondas... sed ĉu vi vere
volas iri ĝis Aachen per biciklo ?* »
« *Jes, hodiaŭ ĝis Aachen ! Mi scias,
ke mi alvenos nur vespere, sed tio ne
gravas.* » « *Neniam !!! ŝi ekkrias,
neniam, Aachen estas multe tro for !*

Eble vi alvenos vespere, sed ne antaŭ la deka horo ! »

Sen perdi kuraĝon mi do daŭrigas en la indikita direkto. Mi pensas : *«Ŝi estas maljuna, eble ŝi neniam atingus Aachen. Sed mi ja ! »*

Fakte mi pravas kaj ŝi malpravas, ĉar eĉ post kromvojo ĉirkaŭ monteto mi atingas la urbegon Aachen je 18h40. Mi havas ŝancon, ke ĉifoje mia gastiganto ne loĝas en la centro, nek aliflanke de la urbo ; lia hejmo sufiĉe rapide troveblas en modesta kvartalo.



La domo kie loĝas Jurij Arŝanskij.

Jurij Arŝanskij, kiu loĝas en la funda domo, ne estas hejme nun. Li verŝajne ne ankoraŭ revenis el sia laboro. Kaj la enirpordo ne malfermeblas. Mi do starigas mian biciklon kontraŭ la domon, sidiĝas sur la ŝtuparo de la placentra monumenteto kaj malfermas mian Novan Testamenton.

Mi ne legas tre longe, ĉar baldaŭ najbaro, kiu sin tenis ĉe fenestro, alparolas min. Mi klarigaŝ, kial mi atendas ĉi-tie kaj ni atendas kune, iom babilante germane. Ĉu li aŭdas, ke la germana ne estas mia denaska lingvo ?

Tempo forpasas. Homoj venas al la domoj kaj eniras tra la diversaj pordoj. Mi rigardas ilin pripensante, ĉu unu el ili estas mia gastiganto. Iam mi eĉ leviĝas, kiam iu estas enironta kaj diras en esperanto : *«Ĉu vi estas Jurij ? »* Li ne respondas kaj eniras. Verŝajne li ne aŭdis, mi do ne pensas, ke estas li.

Post momento alia najbarino jam aperinta, estas la 9-a horo, proponas al mi kafon. Kiam mi klarigas, ke mi kontaktis Jurij kaj gastigis ĉe li pere de esperanto, ŝi diras : *«Jes, li parolas tiun lingvon. Sed mi ne scias multon pri li, li tre malofte parolas kun ni, li estas soleca homo... Li estas ja verdulo, li ĉiam lasas fenestron malfermitan kun planto, vidu tie je la dua etaĝo ! »*

Mi komencas pripensi, kiel mi faros, se mi ne povos dormi ĉe li... mi demandas al tiu najbarino, ĉu ŝi konas junularan gastejon. Ŝi serĉas en jarlibro kaj malgrimpas surstraten por montri al mi sur mapo, kie tio troviĝas. Dum ni rigardas, ŝia filino tamen iras vidi per sia ŝlosilo ĉe Jurij, ĉu vere li ne estas hejme. Ŝi revenas ekkriante : *« Ja, li estas tie ! »* Li fakte alvenis sen rimarki min kaj sen aŭdi, kiam mi vokis lin.

Estante tre afabla, Jurij Arŝanski ŝajnas esti la plej stranga originalulo, kiun mi renkontis kaj renkontos dum mia vojaĝo. Li estas moldavo de ukraina patrino kaj venis instaliĝi en Germanion antaŭ malmultaj jaroj. Li parolas la moldavan, la rusan, la rumanan, la germanan lingvojn, kaj esperanton kompreneble.



Jurij Arŝanskij.

Dum mi telefonas kun mia patrino, li demandas : « *Diru nur rapide, teo aŭ kafo ?* »

Ĝis malfrue ni trinkas bonan teon el ĉinaj tasetoj kaj manĝas specon de domfaritaj “bulkoj” kaj la *lekerli*, kiujn mi alportis. Li aŭskultigas al mi belan muzikon el slavaj landoj. Mi rakontas mian vojaĝon en Rusio, kiun mi faris antaŭ du jaroj, kaj li parolas kun ardo pri rusaj poetoj, kiujn li ŝategas. Li diras, ke ankaŭ li skribas poemojn kaj li montras al mi artikolon, kiun li skribis ruse por iu gazeto.

Endormiĝante mi finfine memoras la nomon de vilaĝo, en kiun mi iris en Rusio : Karamiŝiva. Jurij diras, ke eble lia eksedzino venis el tiu vilaĝeto.

London 14an de julio : 9a tago

Mi vekigigas aŭdante *la Printempon* de Vivaldi : Kia agrabla vekilo !

Dum ni matenmanĝas per la samaj specialaj bulkoj, kiel hieraŭ vespere, kaj trinkas teon el la samaj tasoj,

Jurij donacas al mi cd-muzikon kun multaj kantoj de bonega rusa kantistino Pelegeja kaj aliaj slavaj muzikoj. Dum la venonta jaro mia patro senĉese aŭskultos ilin.

Finfine ni iras serĉi mian biciklon en la kelo kaj, dum mi kontrolas mian orientiĝon per mia kompasoj antaŭ mia foriro, Jurij fotas min el ĉiuj anguloj. La najbaroj reaperas ĉe la fenestroj, mi adiaŭas ilin kaj dankas ilin pro ilia kuneco de hieraŭ.

Forlasante Aachen mi haltas en supermarkto por reaĉeti fromaĝon kaj panon por miaj tagmanĝoj. La fromaĝo estas franca kaj sviso aĉetas ĝin en Germanio kaj alportos ĝin en Nederlando kaj en Belgion. Kia internacieco, ĉu ne ?

Rapide mi alvenas al la nederlanda landlimo. Kun emocioj mi eniras tiun landon, en kiu mi neniam estis antaŭe. Onidire Nederlando estas ebena lando tute malmonta. Tamen tiom strange ŝajneblas, dum unu

horo mi devas grimpi sur eble la solan monteton de la lando.


Alvenante ŝvitantete sur la supro mi haltas en parketo por pikniki.

Kvankam Roterdamo, mia fina celo, troviĝas en tiu-ĉi lando, mi hodiaŭ nur transiras parteton de Nederlando, reironte en ĝin pli nord-okcidente post kelkaj tagoj.

Efektive post du aŭ tri horoj mi jam estas serĉanta eblon transiri la riveron Maas, kiu landlimas kun Belgio.

Jen la solvo ! Krom tiu de aŭtoŝoseo ne uzebla sen aŭtomobilo ne troviĝas ponto, sed ia ŝipeto (aŭ pli precize prameto), kiu senĉese iras dekstren kaj maldekstren de la rivero. La pramisto petas unu eŭron.

Belgion ankaŭ mi neniam vidis antaŭe kaj ĉi-tie por la unua fojo de mia vojaĝo (kaj fakte la sola) mi profitas de la riverakvo min banante.



La prameto

La hodiaŭa etapo ne estas longa, tiel mi havas tempon. Sufiĉos sekvi la riveron norden, poste iri iom okcidenten kaj sekvi kanalon denove norden kaj mi alvenos en Lanklaar. Mi do profitas momenton de la temperaturtaŭga akvo, iom naĝante kun aŭ kontraŭ la fluo.

Alvenante ĉe la sekvota kanalo proksimume je la kvara horo mi sentas emon manĝi glaciaĵon, ian italan glaciaĵon, same kiel mi manĝis lastmerkrede en Waldsee. Tiam troviĝas ponto, kiu kondukas al vilaĝo tuj aliflanke de la kanalo. Kvankam la biciklovojo ne troviĝas aliflanke, tamen mi decidas iri al tiu vilaĝo esperante trovi glacivendejon. Ne-kredeble : ĵus pasinte la ponton, jen la serĉataĵon ! Kaj iu diras, ke ili ĵus malfermis la vendejon lastsemajne !

En Lanklaar Kriss atendas min en kvartalo, kiu ŝajnas pli industria ol loĝeja. Hangaroj kuŝas unu apud la aliaj kaj tie lia familio havas sian komercon de legomoj kaj fruktoj kaj sian loĝejon. Per sia aŭtomobilo Kriss veturigas nin al iu loka restoracio. Li enŝaltas la radion. Mi nenion komprenas, ĉar ili parolas flandre (dialekto de la nederlanda), sed li klarigas al mi, ke temas pri politiko : Estas granda problemo en la lando inter Valonio kaj Flandrio, kaj politikistoj devas trovi solvon ĝis hodiaŭ vespere. Morgaŭ ni aŭdos, ke la problemo ne solviĝis kaj ke la belga prezidento abdikas. Estas la krizo.

En la restoracieto ni manĝas fritojn kaj babilas kun la tenanto. Li kaj aliaj konatoj de Kriss interesiĝas pri esperanto, sed neniu vere volas lerni ĝin.

Mi dormas en la ĉambro de la frato de Kriss, kiu nun estas for. El tiu ĉambro eblas vidi la grizajn hangarajn tegmentojn de la kvartalo sub roza vespera ĉielo.

(Fino venontnumere)

Meza Oriento kaj Meza Okcidento

Pri la 2a Mezorianta Kunveno en Iznik (Turkujo)

okazinta komence de aprilo 2009



Parto de la partoprenantoj formantaj malgrandan UK-on.

Iam antaŭ longa tempo ekzistis aparta kontinento, kiu ne estis registrita en la mapoj, sed nur en la kapoj de la homoj. Temis pri la kontinento "Mediterraneo", kiu konsistis el ĉiuj landoj ĉirkaŭ tiu maro. Post la malkovro de Ameriko kaj la potenco de nordeŭropaj landoj oni provis ĉiurimede forviŝi ĝin el la mapoj kaj el la kapoj. Oni sukcesis pri la mapoj sed ne pri la kapoj.

La limoj de tiu kontinento iom kaprice tranĉas landojn. Ekzemple

Milano certe estas pli simila al Munkeno en Germanujo, ol al Palermo en Sicilio. Siaflanke Napolo estas pli proksima al Istanbul, ol al Milano.

Ĉiokaze ĉi tiu longa enkonduko utilas nur por diri, ke Turkujo certe estas parto de la mediteranea kontinento, kaj ke tie okazis la 2a Mezorianta Kunveno, en la urbo Iznik, du horojn sude de Istanbul, per ŝipo aŭ aŭtobuso. Iznik estas la turklingva nomo (kaj, same kiel la grandurbo iam nomata Konstantino-

polo, en turka alfabeto skribiĝas per komenca litero i kun punkto, (tial, en la sekvo de ĉi tiu teksto, tiu litero i aperas malmajuskle, por ke videblu la punkto), sed tiu urbo iznik estas pli konata en Okcidento per la antikva nomo "Nicaea".



Ruinoj el la antikva urbo Nicaea.

Estas tie, ke okazis la fama eklezia interkonsiliĝo por decidi ĉu Kristo estas nur homo aŭ samtempe homo kaj dio. Estis la tempoj de Konstantino la granda kaj tiaj

disputoj prenis la lokon de tiuj pri ata/ita en Esperantujo !

La Mezoriantaj Kunvenoj estas kunvenoj por kunmeti esperantistojn de tiu batalanta regiono kaj ebligi rektajn kontaktojn inter ili. Ĉi-foje el la Meza Oriento partoprenis grupoj el Irano, Turkujo kaj Israelo, kaj ni aŭdis prelegojn pri la esperantomovado en tiuj landoj. La plej malforta movado inter tiuj tri landoj estas en Turkujo, sed ĝi estas nun reviviĝanta kaj reorganiziĝanta. La kunvenon partoprenis ankaŭ tri junaj lernantoj de esperanto el istanbula lernejo, kie normale instruas Murat Özdizdar, la turka animo de la kunveno. En tiu lernejo csehmetodis, jam dum du semajnoj antaŭ la kunveno, Tereza Kapista el Beogrado.



Murat Özdizdar, la organizanto kaj turka animo de la kunveno

Krom la mezorientanoj ĉi-jare estis homoj el aliaj 14 landoj (de Usono al Latvujo, de Pollando al Hispanujo, ktp.) Temis pri vere malgranda UK-eto. Laŭ elcentoj, Svislando per 2 romandaj partoprenantoj kaj per po unu el Tiĉino kaj Alemanio agrable peze kaj multlingve reprezentigis.

Renato Corsetti jam antaŭe menciis la prelegojn. Al ili oni devas aldoni aliajn (ekzemple tiun de la itala profesoro Davide Astori pri stereotipaj antaŭjuĝoj pri la turkoj en Eŭropo). Mi ne forgesu diri pri la vesperaj programoj, en kiuj aktivan rolon havis konata pola esperantisto, Georgo Handzlik, kiu prezentis koncerton de siaj kantoj. Alia aktiva rolanto estis Sasa Pilipovic, aktoro el Beogrado, kiu prezentis la kabaredan spektaklon, kiun li jam ludis pasintjare dum la UK.

Ne mankis, eĉ aktive malmankis (= abundis), ekskursoj al iznik mem, al la ĉirkaŭaj lagoj, al Bursa, la kvara urbo en Turkujo. Ni ĉiuj, duonprivate, duongrupe antaŭkongresis en istanbulo, aŭskultis la muezinajn vokojn al la preĝo kaj al la savo (sed grandparte malatentis ilin), vagis tra la bazaroj, aĉetumis kaj feliĉis. Preskaŭ ĉiuj vizitis la eksan haremon kaj reve rigardis la Bosforon dum ŝip-veturado sur ĝi.

La urbo iznik estas en 2009 ankoraŭ ĉirkaŭata de disfaliĝanta muro kvazaŭ sen truoj en ĝi. De urbo iama ĝi fariĝis multe pli modesta vilaĝo nuntempe, ol kiam eklezia interkonsiliĝo okazis, ĉar nun en iznik loĝas ĉefe agrikulturista popolo de nur ĉirkaŭ 20-mil personoj. Dum MK kunvenis, la perzik-arboj

plene floris helrozkolore : La iznika lago donas klimato bonan stabilecon, tiel fruktaroj, ankaŭ aliaj krom persikoj, abundas. Fruktoj estas gravaj, flanke al ankaŭ la olivoj.



Moskeo en la urbo iznik

Ne estas io alia rimarkinda por diri, krom tio, ke Zamenhof bedaŭrinde ne konis la lingvon turkan. Se li estus koninta ĝin, esperanto estus ankoraŭ pli aglutina kaj ankoraŭ pli regula [kuriozaĵo, tamen vera: la turka estas la sola lingvo en la mondo, en kiu beboj lernantaj ĝin tute ne faras provojn reguligi la lingvon, simple ĉar ĝi estas tiom regula, ke ne plu estas spaco por pli-reguligi ĝin].

La 3a Mezorianta Kunveno okazos en alia parto de la mediteranea kontinento. Tre verŝajne en Tunizio aŭ en Egiptujo. Ĉiuj estas invitataj partopreni ĝin. Jam ĉe la 1-a MK en Amman, pasintjare, partoprenis pluraj denaskaj arablingvaj esperantistoj. Mi, Ueli Haenni, mem forte esperis renkonti tiujn dum la 2-a MK (mia unua), sed la arablingvaj aliĝintoj el diversaj landoj fine kaj bedaŭrinde ne povis ĉeesti.

Eventuale informiĝu pri 3a MK ĉe:
araba.komisiono@gmail.com

aŭ malrapidpoŝte/telefone sen @: ĉe
Ueli Haenni, Linckweg 2, Postfach,
3052 Zollikofen, 031 911 64 72.

Raportis, kun aldonoj kaj fotoj de
Elisabeth kaj Dominique de Mestral
el Romandio kaj Giuseppe Castelli el

la suda Tiĉino, la ankoraŭ vojaĝanta
Ueli Haenni el Bern, Alemanio, sur-
baze de teksto preskaŭ preta de la
kunorganizinto de la 2a MK, Renato
Corsetti, Italujo.

-oOo-

Mireille Grosjean

tiel bilancas sian restadon en Japanio

Mi estis en Japanio de la 10a de oktobro 2008 ĝis la 8a de aprilo 2009, do dum ses monatoj, tio estas dum 180 tagoj.

Mi estis gasto en 22 malsamaj esperantistaj familioj por unu aŭ pluraj noktoj.

Mi dormis en lito 129 fojojn, el kiuj 34 en hotelo, 12 en esperantistaj familioj kaj 83 en la familio Tahira en Kyoto, mia bazo.

Mi dormis sur futono 50 fojojn, el kiuj 6 en hotelo kaj 44 en esperantistaj familioj.

Mi tranoktis dum 40 noktoj en hotelo, tio estas malpli ol la kvarono de mia restado.

Sume 179 noktoj por restado de 180 tagoj, ĉio en ordo.

MI ELKORE DANKAS AL MIAJ GASTIGANTOJ !!!!

Dum tiu restado mi faris :

29 lingvokursojn (1-2 horoj).

19 partoprenojn en kluboj.

15 prelegojn en klubo aŭ kongreso.

16 prelegojn publikajn.

7 intervjuojn.

Entute 86 intervenojn.

Mi verkis ĉirkaŭ 300 artikolojn sur mia blogo.

Pliaj tekstoj kaj analizoj venos.

MI HAVIS GRANDAN ĜOJON KAJ PLEZURON FARI TION!!!!

Elkore salutas Mirejo

Kaj tutcerte ĉiuj aŭdos kun granda intereso Mirejon raporti pri ĉio tio la sabaton 27-an de junio en la renkonto, kiun organizos CDELI kaj SES en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds.

Redaktas: Richard Schneller (rs), Höhenstrasse 1 b, CH-9300 Wittenbach,
rischneller(ĉe)gmail.com. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Alloga Japanio

Mireille Grosjean estis intervjuita de d-ro Hideki HARADA (Okayama) ĉe Pola Radio en la elsendo "Semajna interparolo" la 30an de januaro 2009. Ŝi parolis pri siaj impresoj en Japanio post pli ol trimonata restado. Mireille Grosjean nun faras longan vojaĝon tra la mondo, interalie en Japanio.

Harada : Hodiaŭ nia mikrofona amiko estas s-ino Mireille Grosjean. Ŝi estas la kunprezidanto de Svisa Esperanto-Asocio kaj reprezentanto de Svislando en la Komitato de UEA, kaj ankaŭ ŝi estas prezidanto de Internacia Ekzamena Komisiono. Ŝi nun restadas en Japanio ekde la Japana Esperanto-Kongreso en Wakayama last-oktobre. Ŝi vizitas diversajn lokojn en Japanio.

Mirejo, vi estas jam dum ok monatoj for de via hejmlando, Svislando. Kiel tio eblas?

Mirejo : Jes, fakte mi forlasis Svislandon la 15an de septembro. Estas tri faktoroj, kiuj permesas al mi fari tiun longan mondvojaĝon. Unue miaj infanoj estas plenkreskuloj; mia edzo mortis antaŭ du jaroj. Tio estas, ke nun mi vivas memstare, sola, do tio estas la unua faktoro. La dua faktoro estas, ke mi finlaboris en julio

2008, mi emeritiĝis. Do mi ne devas por mia laboro resti en Svislando. Tria faktoro estas, ke por la Esperanto-movado mi ĉefe laboras per mia komputilo pere de la reto kaj tion mi povas fari ie ajn en la mondo. Pro tiuj faktoroj kaj pro mia intereso pri Azio ĝenerale kaj pri Japanio pli trafe, mi decidis por pli longa tempo restadi en Azio. Nun mi havas tutmondan itineron. Unue mi atingis Koreion. Mi estis en Koreio dum preskaŭ monato, kaj mi havis grandan ĝojon malkovri la movadon tie, malkovri la landon. Mi povis viziti plurajn urbojn kaj estis tre interesa momento en mia vojaĝo. Nun mi estas en Japanio por ses monatoj. Poste mi atingos Tajvanon, kaj poste, estis invito de miaj kanadaj amikoj, kaj nun venis la ideo, ke mi el Tajvano atingos unue Vankuveron kaj poste Montrealon kaj poste, en

majo 2009, mi finfine atingos Svislandon.

Harada : Vi havas apartan lignon al Japanio.

Mirejo : Do, unue en 1982 mi komencis praktiki aikidoon. Aikido estas memdefenda arto tute pacema aŭ pacama, tute proksima de la japana kulturo kaj tradicio. Mi ekkonis la japanan kulturon tiel. Poste mi decidis, mia familio kaj mi, vojaĝi al Japanio. Tio okazis la unuan fojon en 1985 kaj tiam mi vojaĝis sen Esperanto. Mi tute ne sciis, kio estas Esperanto. Reveninte al Svislando en 1985 mi vidis ekspozicion pri Esperanto kaj tiam mi decidis eklerni la lingvon kaj tiam estis la komenco de mia agado kaj intereso pri Esperanto.

Harada : Do, vi nun estas jam por ses monatoj en Japanio. Kion vi faris, kiel vi vivas?

Mirejo : Fakte mi restadas, mi ne parolas pri vojaĝo, mi parolas pri restado. Kaj se iu demandas al mi, kie mi loĝas, mia respondo estas: Mi loĝas en Kyooto; en Kyooto mi havas bazon, ĉar en la Komitato de UEA, kie mi estas nome de Svislando, mi konatiĝis tie kun du karaj koleginoj el Japanio, tio estas SYOOZI Keiko kaj TAHIRA Masako, kaj mi havis la inviton de TAHIRA Masako loĝi ĉe ŝi en Kyooto. Tio estas, ke mi povas vojaĝi, mi revenas al Kyooto, mi iras al iu alia loko kaj revenas al Kyooto. Tio estas mia sistemo. La celo estas, ke mi deziras vidi tri sezonojn. Jam du-

foje mi vidis Japanion en somero. Ankaŭ dum Universala Kongreso en 2007 mi restadis dum kvin semajnoj en Japanio dum la somero, dum la varmega somero japana, kaj mi vere arde deziris travivi la aŭtunon, la vintron kaj la printempon. Kaj tio okazas nun; ni estas en januaro. Mi vidis belegan aŭtunon. Kaj nun mi ĵus revenas el la norda marbordo, kie estis sufiĉe multe da neĝo, do mi vidas nun la vintron, kaj baldaŭ venos printempo.

Mi deziras viziti la tutan landon. Tio estas, ke jam en novembro mi estis en Kyuusyuu en la tute okcidenta, plenokcidenta parto de Japanio, kaj post du semajnoj mi forlasos Kyooton por tri semajnoj atingonte Hokkaido, la nordan insulon de Japanio, en februaro. Oni anoncas temperaturojn de minus 20 gradoj, do mi vidos. Mia celo, mia vivo, estas, ke vaste mi turismas sed mi ankaŭ vizitas klubojn, mi renkontas samideanojn. Estas tre interesaj kontaktoj. Vere mi tre ĝojas, estas multaj vesperoj, kaj ankaŭ manĝoj, bankedoj kaj interparoladoj kaj amikaj vesperoj. Mi povas prelegi, mi ofte prelegis pri Svislando. Kaj ankaŭ mi povas instrui; mi partoprenis en pluraj kursoj. Mi nun havas grandan materialon pri tio, kaj mi iras laŭ la invitoj, mi denove estos en marto en Tookyo kaj en Yokohama. Kaj mi estos en multaj aliaj urboj laŭ mia vojaĝo, ekzemple al la nordo.

Mi vizitos tri, kvar urbojn, kie kluboj jam atendas min.

Plie mi lernas la japanan lingvon; mi multe aŭdas kaj legas. Mi legas la bazajn silabajn literojn, ne ĉiujn ideogramojn. Kaj ankaŭ mi povas havi tempon por lerni la japanan lingvon. Mi ankaŭ povis publike prelegi; tio estas tre interesa fakto. Mi prelegis en Pacmuzeo en Hiroŝima en la germana kaj prof. OKAMOTO tradukis al la japana. Mi prelegis en Okayama, tuj kiam mi alvenis; kaj vi HARADA-san tradukis al la japana. Mi estis en la Universitato de Kansai en Oosaka, kie mi prelegis ankaŭ en Esperanto pri la politikaj strukturoj de Svislando; kaj tie prof. TERAZIMA tradukis al la japana por siaj studentoj. Kaj nun, ĵus nun mi menciis du gravajn pacbatalantojn en Japanio: OKAMOTO-sensei kaj TERAZIMA-sensei estas tre gravaj kontaktoj por mi, kunlabori kun ĉiuj personoj kaj studi kion ni povas japanskale kaj mondiskale fari por la tutmonda paco.

Harada : Do dum via unua vojaĝo en 1985, vi ne konas Esperanton, kiel vi jam diris. Dum la dua kaj la tria vojaĝo, jes. Ĉu vi konstatas diferencojn inter tiuj vojaĝoj?

Mirejo : Certe la diferencoj estas gigantaj. Dum la unua vojaĝo mi estis en Japanio dum la somero, ni sentis la varmecon, ni povis manĝi japanajn manĝojn, gustumi. Ni povis aŭdi la bruojn kaj flari la odorojn, parfumojn ktp.

Ni povis vidi, sed ni ne povis demandi kaj ricevi, havi informojn. Do certe bazajn informojn mi povis havi per la angla lingvo, sed informoj en la stilo, sur kiu vojo estas iu trajno al iu urbo. Sed pere de Esperanto ni havas kontaktojn, ni eniras familiojn, ni eniras la domojn, ni havas amikajn kontaktojn, ni havas precizajn detalajn informojn, kaj ni estas vere en amikaj rilatoj kaj tio sen Esperanto tute ne eblas.

Harada : Dankon pro via bona komplimento al la esperantistoj en Japanio. Ĉu ne japanoj povas facile turismi en Japanio?

Mirejo : Certe jes. Ĉar unue la lando estas tre bone organizita. Trajnoj kaj transportoj ĝenerale kaj hoteloj. Oni ĉiam povas elekti inter hoteloj okcidentstilaj aŭ hoteloj japanstilaj, ryokan. Kaj se oni uzas ryokan oni atingas tre malmultekostajn prezojn. Ankaŭ se oni manĝas japanstile iun rizon kun fiŝo, oni povas tre malmultekoste vojaĝi kaj manĝi. Plie tre agrable estas, ke estas tre sekura lando, Japanio, kaj pura lando. Oni sentas sin tute bona. Hodiaŭ matene mi estis en muzeo; malgranda muzeo. Mi lasis mian mansakon ĉe la enirejo, kaj mi migris iom tra kelkaj ĉambroj; tio tute bone eblas en Japanio. Se oni estas en la stacidomoj kaj trajnoj, gravaj indikoj ekzistas en niaj literoj. Kaj la gravaj informoj estas ankaŭ en la angla. Do vere estas neniu problemo. Oni ankaŭ povas demandi kaj ne ĉiam oni

obtenas respondojn en la angla, sed oni obtenas iujn indikojn aŭ helpojn, ĉiam homoj estas tre tre afablaj kaj helpemaj, kaj tio vere estas tre agrabla vojaĝo kaj restado. Mi devas nepre substreki, ke estas belega lando, kiu etendiĝas vastskale kaj estas tre malsamaj klimatoj, regionoj kaj vidindaĵoj estas tre malsamaj, variaj, buntaj; kaj multaj, multaj kulturaj aferoj. Mi vidis elstarajn muzeojn, mi klopodas viziti templojn, ĝardenojn kaj kastelojn; tion mi ŝatas. Sed kiam mi alvenas al iu loko, mi ĉiam konstatis, ke plej bone oni sekvu la konsilojn de la indiĝenoj de la loko kaj personoj. Kaj kiam mi estas akceptita en iu loko, ĉiam la esperantistoj de tiu loko plej bone scias, kion oni devas unue viziti, kaj tiel mi malkovris elstarajn lokojn. Kaj ankaŭ kun esperantistoj iu viro hieraŭ prenis nin. Mi estis sur la duno en Tottori kaj li proponis iun veturadon kaj ni vidis belegan marbordon dum unu horo ni estis kun li, kaj estis belegaj lokoj, kiujn ni povis vidi. Kaj kompreneble kun gesamideanoj estas ankoraŭ pli agrable viziti kaj babili kaj havi kontaktojn.

Harada : Mi aŭdis, ke vi preparas rakontaron titolitan “Afrikanoj kaj mi”. Bonvolu paroli al ni pri tiu verkaro.

Mirejo : Do, mi preskaŭ finverkis tiun broŝureton “Afrikanoj kaj mi”, ĉar mi havis spertojn kun afrikanoj de mia infanaĝo, kaj mi decidis verki kaj baldaŭ la verko

aperos, kaj en UK en Bjalistoko oni povos aĉeti ĝin. Estas iuj rakontoj el mia vivo, veraj aferoj, kiuj okazis al mi. Kaj kompreneble finfine estas mia unua vojaĝo al Afriko en somero 2008. Kaj ankaŭ pri tio mi rakontas en tiu verketo. Estas certe amuzaj partoj por legi en iuj kluboj aŭ private legi ion en Esperanto.

Harada : Se tiuj libretoj estos vendataj, tiu kosto iros al la Afrika Komisiono.

Mirejo : Jes, ĉar mi eldonos mem tiun broŝuron. Mi pensas, ke la libreto estu senpaga por personoj el B-tarifaj landoj, kaj la aliaj eble, mi esperas, aĉetos la verkon, kaj la gajno iros al Afrika Komisiono, ĉar nepre ni devas subteni tiun kontinenton, kiu estas grava kontinento en nia mondo.

Harada : Jes, tio estas tre bona ideo.

Mirejo : La venonta verketo estos “Japanoj kaj mi”; estas jam en laboro.

Harada : Bone. Ankaŭ tiujn verketojn certe mi legos. Mi aŭdis, ke vi baldaŭ partoprenos la setubunan feston de Oomoto en Kameoka.

Mirejo : Jes, estas grava festo; mi neniam vidis ĝin. Kaj mi vere volonte denove estos en Ayabe, ĉar Ayabe estas proksima loko ĉe Kyoto. Mi jam estis en 2007 post UK. Estis “bonvenon ĉe Oomoto”, kaj mi estis en Ayabe. Estas mirinda ĝardeno kaj belaj temploj kaj belaj domoj. Do mi estos denove en Ayabe por tiu festo; mi ne

scias, kio precize okazas kutime en setubun-festo; estas grava festo japana, ŝajnas. Kaj mi malkovros tiun feston. Kiel mi povis malkovri maturi en Kyooto. Kaj ofte mi estis en iuj tiaj festoj, kiel

Bizen-maturi; ni estis kune en Bizen apud Okayama. Do estas ofte tiaj ebloj.

Harada : Vi esploru Japanion plu en bona japana etoso. Koran dankon.

Tridek jarojn en la Ora Nordo

- *Richard Schneller*

Recenzo de malnova sed interesa libro aperinta en 1931

La aventuristo Jan Welzl (kiu naskiĝis en Zábřeh, Moravio, en 1868 kaj mortis en Dawson City, Kanado, en 1948) rakontas en tiu libro siajn spertojn en la Arkta maro de Nova Zemlo ĝis Alasko. Tridek jarojn li pasigis tie, kie li loĝis en groto sur la insulo Nova Siberio proksime de eskimoj, ĉasis kaj entreprenis longajn vojaĝojn per ŝipo aŭ glitveturilo komercante kun eskimoj kaj orfosistoj sur diversaj insuloj de la Arkta maro. Dum vojaĝo al Nord-Ameriko en la jaro 1924 li travivis ŝiprompon proksime de Seattle, perdis ĉiujn havaĵojn kaj oficialajn identigilojn kaj estis resendita kiel suspektinda persono al Eŭropo. En la jaro 1929 li rakontis en Brno siajn travivaĵojn en la arkta regiono al du ĵurnalistoj kaj la fruktoj de ĉi tiu kunlaboro estis pluraj libroj. El tiuj la Moraviaj Esperanto-Pioniroj eldonis en 1931 “Tridek ja-

rojn en la Ora Nordo” en bona kaj facile legebla traduko.

Jan Welzl kiel juna seruristo 23-jara piede migris en 1888 al Ĝenovo kaj de tie vojaĝis kiel hejtisto sur ŝipo preskaŭ tra la tuta mondo. En Vladivostoko li volis vidi la lagon Bajkalo kaj en 1893 kunlaboris al la konstruo de ponto por la Transsiberia fervojo. Kiam la konstrulaboroj finiĝis, li decidis migri norden trans Siberio. Li jungis ĉevalon antaŭ ĉaro kun la vivnecesaĵoj kaj iloj. Por orientiĝi li ne helpis sin per mapo, sed informiĝis pri la direkto ĉe la renkontitaj popolanoj kaj tiamaniere ja faris kromvojojn. Tamen li ne bedaŭris, ĉar tiel li konatiĝis kun la regiono kaj la diversaj mongolaj gentoj de Siberio (ĉukĉoj, ĉaŭĉoj, jurtenoj, jakutoj kaj lamutoj) kaj povis observi ties vivmanierojn. Li ankaŭ renkontis kondamnitajn en Siberio kaj estis kortuŝita pro la sorto de tiuj malfeliĉaj homoj.

Kiam li alvenis ĉe la rivero Kolimo, li konstruis flosan, ŝarĝis ĝin per la ĉevalo kaj la ĉaro kaj tiel navigis dum tri monatoj evitante penigan trapason de montaro.



Ĉi-jare Jan Welzl revenas al sia Ora Nordo.

JAN WELZL:
TRIDEK JAROJN
EN LA ORA NORDO.

*

EN OLOMOUC 1931.
ESPERANTIGIS KAJ ELDONIS
MORAVIAJ ESPERANTO PIONIROJ.

En la tundraj regionoj de Siberio li devis forlasi sian amatan ĉevalon kaj interŝanĝis ĝin kontraŭ boacoj kaj glitveturilo kaj atingis la Novsiberiajn insulojn sur la glaciigita Arkta maro. Tie li unue vivis preskaŭ kiel “arkta Robinsono” en groto, ĉasante kaj fiŝkaptante. Mirigis lin la naturaj fenomenoj kiel la subita glaciigo de la maro en aŭtuno kun granda bruoj, malglaciigo en printempo kaj la arktaj lumfenomenoj. Baldaŭ li konatiĝis kun eskimoj, parte vivtenis sin riparante iliajn ilarojn, partoprenis kampanjojn de balenĉasistoj en la Norda glacia maro kaj fine famiĝis kiel komercisto interŝanĝante vivnecesajn varojn kontraŭ feloj.


Per glitveturilo tirata de hundoj kaj poste ankaŭ per ŝipo li frekventis eskimojn kaj orfosistojn

en la vasta areo de la Arkta oceano. Estis la tempo de la orfosista febro ankaŭ en tiuj regionoj kaj oni malkovris oron sur la Novsiberiaj insuloj. Orserĉistoj ĉiam pli multnombraj alvenis kaj iĝis klientoj de Welzl. Li mem entreprenis ŝipvojaĝon al Alasko kaj sobglitis la riveron Jukono sur floro prospektante pri oro en ĉi tiu regiono.

La vivo en la arka regiono certe ne estis facila pro la malvarmo, la malluma vintro kaj la neĝaj tempestoj. Jan Welzl iam estis blokita dum kvar tagoj pro neĝoŝtormo kaj preskaŭ ne havis manĝaĵojn. Kiam li poste alvenis malsatege ĉe konata arktulo kaj petis lin pri manĝaĵoj, tiu alportis grandan pecon da urso viando. Welzl avide voris ses kilogramojn.

La arktulo miris kaj amuzite kaj ŝerce demandis, ĉu li nun satmanĝis aŭ dezirus ion plian. Welzl respondis ke li volonte manĝus

ankoraŭ salmon kiel deserton. Ĉi tiu okazaĵo famiĝis en la nordo kaj Welzl ricevis la moknomon “Bear Eater” (ursomanĝanto).



La intereso de la libro konsistas ankaŭ en tio, ke la du redaktoroj precizigis al sia rakontanto detalojn pri la vivmaniero kaj kutimoj de eskimoj kaj aliaj popoloj, kun kiuj li havis kontaktojn.

La eskimoj sur la Novsiberiaj insuloj vivis primitive laŭ la tradicio adaptita al la arka klimato kaj naturo. Multaj iloj de la ĉiutaga vivo estis el fiŝaj aŭ balenaj ostoj aŭ fokaj kaj ursaj feloj.

Oni ekscias ankaŭ detalojn pri ilia familia kaj socia vivo. Ne plaĉis al Welzl ilia malpureco kaj kortuŝis lin la malfacila sorto de la virinoj.

En la lastaj ĉapitroj de ĉi tiu libro Welzl rakontas pri malsanoj kaj dentodoloroj malfacile kuracblaj en la tiamaj kondiĉoj. Li priskribas do la simplajn kuracrimedojn utiligatajn de la eskimoj kaj de si mem. Sed ankaŭ necesis kontraŭbatali krimulojn kiel ekzemple la “blankaj tigroj”-n, kiuj vendis venenitan brandon al eskimoj. Post multaj jaroj de kunestado kun eskimoj kaj arktuloj Welzl akiris ilian grandan estimon kaj fariĝis estro kaj la plej ĉefa juĝisto de Nova Siberio. Tio honorigis lin kaj estis ankaŭ bona por lia komerco, sed tiu ofico ne

estis ripoziga, ĉar li devis partopreni persekuton, arestadon kaj kondamnon (plej ofte je morto) de krimuloj laŭ la eskima juro. Same li estis devigata fari raportojn al la foraj oficialuloj en la angla lingvo, pri kiuj li penis en sia groto dum la malluma sezono.

Fine de la libro estas amuza epilogo temanta pri redakta sesio kun tiu originalulo, kiu laŭdire pro la 30-jara restado en la arkta regiono ne sciis, ke intertempe okazis la unua mondmilito. – Welzl poste ne plu sukcesis reatingi la Novsiberiajn insulojn, ĉar la regiono tiam apartenis al Sovetio kaj ne plu eblis ricevi permeson por reiro al la Ora Nordo. Sed ankaŭ reiro al Alasko pro la samaj kaŭzoj ne eblis kaj li fine instaligis en

la kanada urbo Dawson City, unue laborante ĉe fervoja kaj vaporŝipa kompanio kaj post akcidento li vivis kun sia hundo kiel ermito en tiu regiono kaj dediĉis sin al invento de eterna movilo.

La legado de ĉi tiu libro estas tute agrabla, ne nur pro la bona traduko, sed ankaŭ pro la bonhumoro de la aŭtoro, kiu malgraŭ kelkfoje malfacilaj situacioj restas optimisma kaj fidus je siaj sciivolema observkapablo, praktika elturniĝemo kaj bonŝanco. Bedaŭrinde la libro estas jam delonge elĉerpita, sed ĝi prunteblas en biblioteko kiel ekzemple en CDELI. Du ekzempleroj estas tie eĉ aĉeteblaj brokante. Bone estus se ĝi reeldoniĝus aŭ almenaŭ publikiĝus rete.

Senpagaj novaĵgazetoj por labor-pendolantoj – revolucio en Eŭropo kaj en la svisa amaskomunikilaro

(Dua parto)

- *Andreas Künzli*

Ĉi tiu prelego estis prezentita okaze de la 1a Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Jurnalistoj, la 28an de majo 2008 en Vilno (Litovio). La prelego estas provo trakti neesperantan temon per Esperanto

Legu ni, kio okazis en aliaj landoj:

Germanio: En 1999 estis lanĉita de Schibsted la unua eldono de 20 Minuten Köln do en la regiono de Kolonjo. Kontraŭ tiu lanĉo la eldonejo Axel-Springer, eldonisto de Bild Köln, sentante nedeziratan konkurencon kaj minacon de la propra merkata pozicio, lanĉis juran proceson kaj samtempe eldonis la konkurencan gazeton Köln Extra. Poste la alia granda kolonja eldonejo DuMont lanĉis la senpagan gazeton Kölner Morgen. Post juraj plendoj kaj decidoj tien kaj reen, en somero 2001 ĉiuj tri

gazetoj estis ĉesigitaj, ĉefe pro malprofitaj rezultoj. Ĉi tiu epizodo eniris la historion kiel kolonja gazeta milito. Iuj branĉaj reprezentantoj opiniis, ke la redakcia laboro ne estu fordonacita, kaj oni parolis pri kanibaligo de la anoncmerkato. Krome, ŝajnas, ke la germana merkato ne akceptis la tabloidan gazetformaton, kiu estas sukcesa en Britio kaj Norvegio. Oni klarigis, ke la ĉefa kialo por la rifuzo de la tabloidadaj gazetoj konsistis en la germana kalkulsistemo de anoncoj. Tamen, iuj aliaj fakuloj montris sin konvinkitaj, ke la senpaga gazetaro por pendolantoj povus funkcii ankaŭ en Germanio, se la potencaj konkurentoj ne kontraŭus ĝin, kun du eventualaj konsekvoj: aŭ amaso da mono estos detruita aŭ formiĝos funkcia merkato.

Male, en *Aŭstrio* la tabloida formato, aplikata ekzemple de *Kronen-Zeitung*, estas ege sukcesa. La enmerkata partoprenparto de tiu gazeto estas 50%. Do klientoj restas fidelaj al siaj tradicie abonataj gazetoj (kiel *Kronen-Zeitung*, *Kurier* aŭ *Kleine Zeitung*), dum senpagajn gazetojn oni legas nur aldone.

Iuj merkataj kredas, ke en orienta Eŭropo senpagaj gazetoj povus havi sukceson. (Fakte en Litovio mi vidis tian gazeton – ĝia titolo estas 15 min kaj mi trovis kestojn en restoracioj kaj en la universitato! Ĝia grafika aspekto faris al mi pli primitivan impreson kompare kun la svisaj ekzemploj,

le enhavon mi ne tro atentis manke de litovaj lingvaj konuoj.)

En *Francio* 20 minutes troviĝas ĉe la pinto de plej ofte legataj gazetoj. Ĉi tiu franca versio, distribuata en centoj da metrohaltejoj kaj stacidomoj, estas legata de 2,4 milionoj da homoj ĉiutage. Laŭ plej novaj statistikoj, la franca 20 min forpuŝis eĉ la grandan sportgazeton *L'Equipe* kun 2,36 milionoj da legantoj al la dua loko. Ankaŭ la dua senpaga gazeto *Metro*, kiu jam havas 2,04 milionojn da legantoj, kapablas konkurenci kun la alia. Por komparo: *Le Monde* havas ,nur' 1,89 kaj *Le Figaro* havas ,nur' 1,19 milionojn da legantoj.

En *Luksemburgio* *Tamedia* lanĉis, kune kun surloka eldonejo, analogan senpagan gazeton, kiu nomiĝas *L'Essentiel*. En *Hispanio* cirkulas la versio 20 minutos.

En Islando, Danlando kaj Hispanio kaj eble ankoraŭ aliaj landoj estas distribuataj pli da senpagaj ol aĉetitaj gazetoj. En Eŭropo la parto de la senpagaj taggazetoj rilate al la entuta eldonkvanto estas pli ol 20%.

heute – Blick am Abend – Ringier

Ekde majo 2006 en Bazelo, Berno kaj Zuriko estis distribuata ekde la 16 h 00 la senpaga taggazeto heute (hodiaŭ). Ĝi havis 259 000 legantojn kaj estis produktata de la eldonejo Ringier. heute malaperis en majo 2008 kaj estis anstataŭita ĝuste antaŭ la

futbala konkurso Euro 08 de alia gazeto sub la titolo Blick am Abend. Ĝi startis kun eldonkvanto de 220 000 ekzempleroj en Berno, Bazelo, Zuriko kaj Winterthur. La sama redakcio, kiu faris la gazeton heute, redaktas Blick am Abend. La teamo konsistas el 36 laborlokoj. Laŭ koncepto kaj grafiko Blick am Abend tre similas la originalon Blick, kiu antaŭnelonge mem estis koncepte kaj grafike transformita.

Retadreso:

<http://www.blick.ch/blickamabend>

La sama eldonejo produktas la pagendan bulvardan taggazeton Blick (la eldonkvanto de 254 657 ekzempleroj kaj kun atingeco de 727 000 legantoj) kaj la dimanĉan gazeton Sonntags-Blick (kun eldonkvanto de 265 478 ekzempleroj kaj 974 000 legantoj).

Ringier lanĉis en septembro 2006 ankaŭ la priekonomian gazeton Cash daily (en la germana lingvo), kiu estas senpage havebla ĉe 1100 kioskoj de Svislando kaj kiu okupas apartan pozicion inter la senpagaj taggazetoj en Svislando. Antaŭ nelonge la respektinda pagenda priekonomia gazeto Cash estis ĉesigita. Krome Ringier eldonas la dimanĉan senpagan gazeton il Caffee en itallingva Tiĉino.

En orienta Eŭropo Ringier lanĉis en novembro 2005 la senpagan gazeton 24hodin en Prago (Ĉeĥio), kaj en majo 2006 sekvis la senpaga gazeto Compact en Bu-

kareŝto (Rumanio). Estas planataj analogaj gazetproduktoj en Hungario, Slovakio kaj Ukrainio (Blik).

.ch

En septembro 2007 unuafoje aperis la gazeto .ch de la zurika eldonejo Media Punkt AG (delegito de la administra konsilantaro estas Sacha Wigdorovits, kiu partoprenis la fondon de 20 min) kun 430 000 ekzempleroj. Malantaŭ la projekto staras diversaj privataj investoroj el Svislando kaj Aŭstrio. Diference de la aliaj konkurenccgazetoj, kiuj troviĝas en specialaj kestoj en publikaj lokoj, kie multaj homoj preterpasas, .ch konas alian distribukoncepton, kiu similas tiun de Islando (Frétta-bláðið, Bláðið) kaj Danlando (Nyhedsavisen), kie oni enmetas la gazeton en la privatajn leterkestojn rekte, se mi estas ĝuste informita. En la kazo de .ch oni liveras la gazeton ĉiumatene rekte sur specialaj teniloj apud enirejoj de privataj loĝejoj. En la komenco aperis problemoj lige kun la demando ĉu tiu firmao entute rajtas starigi siajn tenilojn sur privata grundo. Ĝis kiam la afero estis klara, la polico malaperigis tiujn tenilojn sur publika grundo. Ankaŭ okazis, ke privatuloj forigis aŭ ŝtelis tenilojn. Ŝajnas, ke intertempe tiuj problemoj estas solvitaj.

La apero de .ch timigis la eldonejon de 20 min, kiu reage altigis tuj la eldonkvanton de la

propra gazeto dum la enmerkatinga fazo de .ch.

Retadreso: www.punkt.ch

News – Tamedia

Kiel plej lasta aŭ plej nova de tiuj senpagaj gazetoj aperas ekde decembro 2007, 2,5 monatojn post la lanĉo de .ch, la senpaga taggazeto News, kiu estas komuna produkto de Tamedia (Tages-Anzeiger 50%, Berner Zeitung) kaj Basler Zeitung po 25%. Konfidencaj fontoj kolportis, ke News aperis reage al la lanĉo de .ch por kontraŭbatali sian konkurenton. La teamo konsistas el 26,5 laborlokoj.

Retadreso: <http://www.news.ch>

Le matin bleu – Edipresse

Le Matin Bleu cirkulas kiel senpaga taggazeto en la franca lingvo en Romandio kun eldonkvanto de 183 000 ekzempleroj. Ĝi estis lanĉita de la eldonejo Edipresse (Lausanne) fine de oktobro 2005, post kiam intertraktoj kun Tamedia fiaskis. En la komenco distribuita ĉefe en la urboj Ĝenevo, Laŭzano, Yverdon, Neuchâtel kaj Fribourg, oni trovas tiun gazeton intertempe ĉie en Romandio.

Kvankam Le Matin Bleu dividas la saman titolon kun la parenca produkto Le Matin, eldonata de la sama eldonejo, kiu eldonas ankaŭ la gazetojn Tribune de Geneve, 24 heures kaj parte Le Temps, ambaŭ gazetoj havas propran memstaran redakcian teamon.

En Romandio iu konkuranto eĉ aŭdacis malinstali la keston de la alia konkuranto !

Retadreso:

<http://bleublog.lematin.ch>

Reagoj, avantaĝoj kaj malavantaĝoj

Unuaj reagoj aperintaj en la jaro 2001 koncernis jenajn punktojn:

Avantaĝoj:

1. La gazetoj por pendolantoj iras novajn vojojn, kiuj povus influi la tradicion gazetaron. Tio havis tamen konsekvon por la tradiciaj gazetoj, kiuj iom perdis de sia eldonkvanto (ekde 2007: precipe Blick: -17 000 legantoj, t.e. -2,5%, NZZ: -15 000 t.e. -4,8%). (Tamen ekzemploj en Germanio, kie senpagaj taggazetoj mankas, montris, ke la eldonkvanto de aĉetitaj gazetoj reduktiĝis en sama grado.)

2. Ĉi tiuj gazetoj prezentas sur mallarĝa spaco alloge preparitajn informojn en simpla skribstilo kaj do servas ankaŭ al publiko, kiuj malpli lerte utiligas printitan gazetaron. La artikoloj estas koncizaj, enhavas malmultajn neologismojn kaj fakterminojn. La artikoloj limigas sin plejparte je komunikado de faktoj sen kuntekstarilato kaj sen fona analizado. Laŭ enketo el la jaro 2001 en Zuriko tiajn gazetojn oni ŝatas, ĉar eblas kapti en mallonga tempo la plej aktualajn kaj koncizajn informojn. Tia gazeto helpas ankaŭ venki la enuon dum atendado. Allogaj oni

trovas la tabloidan gazetformaton kaj la grafikan aspekton. Rubrikoj nomiĝas News, Business, Money, Sport, People, What's up, do oni sekvas modan tendencon angla-lingvan. Tamen ĉefaj rubrikoj kun germanlingvaj titoloj kiel Svislando, Eksterlando, Ekonomio, Sporto ktp. estas konservataj.

3. La gazetoj estas malmulte-koste produktitaj kaj financitaj pere de anoncado kaj varbado. La plimultaj artikoloj estas aĉetitaj de novaĵagentejoj, do la redakta laboro estas minimuma.

4. Do la publiko certe ŝatas tiajn gazetojn, ĉar ili estas senpagaj.

Malavantaĝoj:

1. Apud la ekonomiaj interesoj aperas la demando pri la publicistika kvalito. 11% de la enketitoj opiniis, ke la stilo de tiuj gazetoj tro similas al la sensacia kaj skandalgazetaro aŭ ke la nivelo estas malalta.

2. Enketo el la komenca tempo (jaro 2001) montris interesajn rezultojn koncerne la konsum-konduon: La duono de la legantoj legas nur elekteme, superflugante la artikolojn. 12% trafoliumas la gazeton, la sama kvanto atentas nur unusolan rubrikon. 70% de la legantoj investas ne pli ol 15 minutojn (litovoj lernis de la sperto !) en la legadon de unuopa eldono, averaĝe. 60% legas la gazeton ekster sia domo, survoje aŭ ĉe la laborloko, 20% en la universitato aŭ lernejo. Personoj

kun pli alta socio-ekonomia statuso legas ĝin malpli longe ol aliaj.

3. Pro la senpageco de tiuj gazetoj fakte nur 7% diris, ke ili elspezus monon por ili, se ili devus pagi la gazeton. Nur 8% klare rifuzis la produkton.

4. La duono de la enketitoj trovis, ke la enhavo estas sufiĉe ampleksa. Sed nur 15% konsideras la senpagan gazeton por pendolantoj kiel realan anstataŭaĵon de la tradicia printita gazetaro. Unu kvarono eĉ negative pritaksis tiun gazeton, opiniante ke temas pri tempoperdo.

5. Rubaĵoproblemo: Post kelkaj minutoj da legado oni likvidas (forĵetas) la gazeton. Do iuj el inter la enketitoj konsideras la produkton kiel kontribuon al la malpurigo de la natura ĉirkaŭaĵo. Ekzemple 20 min kaŭzas 68 tunojn da papero ĉiutage.

Aliaj konsideroj:

1. Krom la elpapera gazetproduktado mem ekzistas virtuala prezentiĝo en interreto pere de propra retujo. Per tio oni esperas alligi kaj alligi al la produkto novan celpublikon, antaŭ ĉio la junularon inter 14- kaj 29-jara. La eldonejoj de senpagaj gazetoj por pendolantoj klarigis, ke dekomence oni celis la pli junan publikon, en la espero, ke oni povos altiri ĝin al la abonado de aliaj gazetoj el la sama eldonejo.

Resume kaj konklude: Ŝajnas, ke la nova koncepto de la senpaga taggazeto por pendolantoj estas

ĝenerale akceptata de la publiko. Oni volus kredi, ke la homoj legas pli ofte entute kaj interesiĝas pri la aktualaĵoj (91,6% de la svisoj kaj svisinoj legas gazeton – nova rekordo post la jaro 2000, kaj 92,6% de la svisoj kaj svisinoj legas fakĵurnalon). Aliflanke ekzistas la timo, ke la publiko estas tro altrude nutrata pere de supraĵaj sensaciaj aŭ skandalinformoj, kiuj povas unuflankece eduki iliajn vidpunktojn kaj finfine negative influi la pensmanieron aŭ la menson, malgraŭ la laŭdira neŭtraleco aŭ objektiveco de la prezentitaj informoj.

Voĉo de eksperto

Michael Haller, profesoro pri ĵurnalistiko en Leipzig (Germanio), ne tro kredas je la longdaŭra stabileco de la koncepto de la senpaga taggazetaro por laborpendolantoj kiel komerca modelo. Nu la senpageco de la novaĵoj kaj servoj estas ja alloga. Sed Haller pli kredas je la modelo elektronika, nome ke post 15 jaroj la konsumanto ricevos sian propran, individue tajloritan gazeton, laŭ la temoj, kiuj lin/ŝin interesas kaj mendis de la eldonejo. Aldone al la gazeto la koncerna eldonejo kredeble disponigos al tiu individua abonanto eĉ senpagan printilon, per kiu li/ŝi povas mem produkti sian gazeton. Haller opinias, ke la senpageco de la informoj povas konduki al erozio de la ĵurnalisma kredindeco kaj de la kvalito de la ĵurnalismo

entute. Aliflanke, senpagaj gazetoj, kiuj estas bonkvalite farataj, povas kontribui kiel transmisia rimeno por la abonataj gazetoj. Ĉar en Svislando la senpagaj taggazetoj apartenas al la bonkvalitaj produktoj en amaskomunikiloj, ekzistas espero aŭ perspektivo ĉirilate.

Iuj ĉi tie prezentitaj faktoj, ciferoj kaj argumentoj povas esti jam eksaj aŭ malvalidaj en la momento de la prelego aŭ publikigo, ĉar la evoluo ĉe la senpagaj taggazetoj estas relative rapida kaj do relative ofte povas okazi ŝanĝoj. Kaj ĝuste la novaĵo en tiu merkato estas, ke la eldonejo Tamedia intencas lanĉi la novan gazeton *20 Minuten Friday* por okupi la semajfinan zonon. En tiu nova batala rondo Ringier ne restos pasiva: kiel estis anoncite la 14an de aŭgusto, ĉi tiu eldonejo planas la eldonon de nova senpaga *Lifestyle*-gazeto (vivstila magazino), en kunlaboro kun la moda revuo *Annabelle* kaj *Nightlife-Portal* (noktuma portalo) *till-late.com*.

Ĉi tiu prelego estis prezentita okaze de la 1a Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj, la 28an de majo 2008 en Vilno (Litovio). La prelego estas provo trakti neesperantan temon per Esperanto. Mi sugestas al la kolegoj de TEĴA imiti la ekzemplon kaj raportu pri la gazetaro de sia propra lando.



Svisa kalendaro

Maje

- 4 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 6 : Luzern : LES-Kunveno.
- 6 : Wil : EKW-Kunveno en Flawil.
- 8 : Zürich : ESZ-Kunveno.
- 15 : Chaux-de-Fonds : Ĝenerala Asembleo de la Amikoj de CDELI.
- 16 : Chaux-de-Fonds : Ĝenerala Kunveno de SES, kaj Kunveno de la Esperanto-Amikaro de CDELI.
- 25 : Feria periodo ĉe CDELI ĝis junio 27-a.
- 28 : Basel : ESB-Kunveno.

Junie

- 3 : Luzern : LES-Kunveno.
- 3 : Wil : EKW-Kunveno.
- 13 : Lausanne : Ekskurso.
- 25 : Basel : ESB-Kunveno : Grün'80.
- 27 : Rekomenco de la laboro ĉe CDELI.
- 27 : Chaux-de-Fonds : Prelegas Mireille Grosjean.

Julie

- 1 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 1 : Luzern : LES-Kunveno.
- 1 : Wil : EKW-Kunveno.
- 9 : Basel : ESB-Kunveno ĉe familio Focke.
- 25 : Bjalistoko : 94a Universala Kongreso de Esperanto ĝis la 1-a de aŭgusto.

Aŭguste

- 7 : Luzern : LES-Kunveno.
- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 16 : Wil : Ekskurso al Winterthur.
- 22 : Chaux-de-Fonds : Prelegas Mireille Grosjean.
- 23 : Basel : ESB : Ŝipekskurso al Rheinfelden.

Septembre

- 2 : Luzern : LES-Kunveno.
- 2 : Wil : EKW-Kunveno.
- 5 : Chaux-de-Fonds : Festo honore al Zamenhof.
- 7 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 24 : Basel : ESB-Kunveno.

- 26 : Chaux-de-Fonds: CDELI-Studsabato.
- 26 : Zürich : ESZ-Kunveno.

Oktobre

- 5 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 7 : Luzern : LES-Kunveno.
- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.
- 22 : Basel : ESB-Kunveno.
- 24 : Chaux-de-Fonds: CDELI-Studsabato.

Novembre

- 2 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 4 : Luzern : LES-Kunveno.
- 5 : Wil : EKW-Kunveno.
- 21 : Chaux-de-Fonds: CDELI-Studsabato.
- 26 : Basel : ESB-Kunveno.

Decembre

- 2 : Luzern : LES-Kunveno..
- 2 : Wil : EKW-Kunveno : Fonduovespero.
- 6 : Chaux-de-Fonds : CDELI-Kultura seminario.
- 10 : Luzern : LES-Kunveno.
- 11 : Zürich : ESZ-Kunveno : Zamenhoffesto.
- 12 : Chaux-de-Fonds: CDELI-Studsabato.
- 12 : Lausanne : Zamenhofa festo.

2010

Januare

- 4 : Lausanne : LES-Kunveno.
- 6 : Luzern : LES-Kunveno.
- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.

Februare

- 1 : Lausanne : LES : Ĝenerala Asembleo.

Marte

- 1 : Lausanne : LES-Kunveno.

Aprile

- 10 : Redakta datlimo de *SES informas*.